

1957

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道




中國

I

1957

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO


Budaisma Arto de Tibeto



Culakang-templo en Lhasa



Princo Sidato transiris la urbomuron (*Tang-dinastio*)



Ĉi tiujn fotojn de konstruaĵoj, freskoj kaj skulptaĵoj ni prezentas al vi kiel ilustraĵojn al la samtitola artikolo

(*Daŭrigo sur p. 35*)

Ĉaŝelhunpo-templo en Ŝjekaz

Ĉiela muzikistino (*fresko*)



Dancistinoj (*fresko en Sarlho-templo, 13a jarcento*)



Al Niaj Legantoj

Post kvar jaroj de silentado, nia gazeto "El Popola Ĉinio" denove aperas. Jen ni prezentas al vi la prov-numeron de ĝia nova serio kaj samtempe sendas al vi ĉiuj nian elkoran saluton.

Kiel multaj el niaj legantoj memoras, la gazeto ĉesis aperi je la fino de 1953, kiam la ĉina Esperanta movado sin trovis en stato de malvigleco. Ekde la printempo de 1956, la verda stelo finfine rebrilas en nia vasta lando, kaj la Ĉina Esp-Ligo paŝo post paŝo refunkciigis. Dum lastaj jaroj, multaj el niaj karaj kaj estimataj eksterlandaj amikoj, konataj kaj nekonataj, milfoje demandis nin: "kial vi ne reaperigis la multe ŝatatan

gazeton?" Jen ni respondas per tiu ĉi prov-numero. Por ni reaperigi ĉi tiun gazeton estas tasko urĝa sed sufiĉe peza, plenumota nur kun viaj helpoj kaj subtenoj.

Por ke ĝi estu interesa kaj utila al niaj legantoj, ni difinas al ĝi jenan novan karakteron:

1) Krom informoj pri historio, tradicio, kutimo kaj moro, ekonomia kaj kultura vivo de la ĉina popolo, ĝi ankaŭ enhavos artikolojn pri Esp-o kaj rubrikojn pri ĉina Esp-movado.

2) Ĝi aperigos materialojn pri ĉina kulturo, kiu kun sia miljara tradicio ja interesas multnombrajn alilandanojn. Ĝi ankaŭ donos sufiĉe da spaco por ĉina literaturo (poemoj, rakontoj, fabeloj, anekdotoj ktp.) kiu diversflanke respegulas la vivon de la ĉina popolo, nuntempan aŭ pasintan.

3) Ĝi aperos ĉiun duan monaton por ke ĝi estu pli ampleksa kaj povu enhavi en si pli malpli longajn literaturaĵojn.

4) La celo de la gazeto restos sama kiel antaŭe, t.e. servi kiel ponto por intimigi la reciprokan komprenon kaj amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

Dum sia pli ol tri jara ekzistado, nia gazeto ne nur trovis multajn interesatojn tra la esperantista mondo, sed ankaŭ tre fervorajn amikojn en diversaj landoj, kiuj sinofere ĝin subtenis kaj helpis diversmaniere. Al ĉiuj nin subtenintaj amikoj ni sendas nian sinceran dankon, kaj ni esperas, ke ili ne ŝparos sian valoran helpon kiun ni soife atendas.

La Red.

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Adreso: P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

ENHAVO

Miaj Travivaĵoj en la Festivalo
Altigas Vivnivelo
La Produktado de Ĉinaj Metiartaroj
La Rozo en la Araba Dezerto
Inijni
Ni Ambaŭ Estas Lernantoj
La Nokto en Pekino
Budaisma Arto de Tibeto
Bildo sur la fronta kovrilo—Konvolvulo
(Pentris Ci Baj-ŝe)
Bildo sur la dorsa kovrilo — Fiŝistino
(Termodlajo de Ĝang Ju-ting)

Miaj Travivaĵoj en la Festivalo



K-do Jang alparolas la kunvenantajn gesamideanojn

LA 24-an de julio ni atingis Moskvon. Mi diris en mi: "Tuj post la aranĝo de la pakajo kaj la ĉambro en la hotelo, mi utiligos la liberajn horojn por rigardi tiun ĉi belan urbon kaj saluti ĝian gastaman popolon."

Tamen mi hezitis kiam mi ekpensis kiamaniere mi irus sur la stratojn, ilin ne konante nek sciante la rusan lingvon. Tial, post la vespermanĝo mi povis fari nur promenadon ĉirkaŭ la hotelo kun kelkaj kamaradoj, kiuj estis eĉ ĉen malpli bona situacio ol mi, komprenante ne unu vorton de la rusa lingvo.

Pasis du tagoj. Fine mi sukcesis telefoni al Profesoro Bokarev, rusa esperantisto, kies adreson al mi donis Ĉina Esperanto-Ligo antaŭ mia forlaso de Pekino. Baldaŭ li vizitis min kun aliaj du rusaj geesperantistoj: k-do Dalidoviĉ kaj k-dino Vera. Ni

Prezidantaro de la esperantista kunveno



ĝoje interparolis ĝis la 10-a horo. K-dino Vera promesis akompani min promeni tra la centro de la urbo en la sekvonta tago, t.e. la 27-a de julio.

Dank' al ŝia akompano, mi vidis belajn placojn, ĉarmajn ĝardenojn, la faman Lenin-bibliotekon, la diversformajn staciojn de la subtera tramvojo kun admirindaj iluminaĵoj kaj ornamaĵoj de mozaikoj, kaj skulptaĵoj. Longaj kaj fortaj brakoj de ŝarĝleviloj moviĝadis en la ĉielo, konstruante novajn domojn anstataŭ la peza korpa laborado de laboristoj. Kolomboj promenadis aplombe sur la Ruĝa Placo. Ili ne fortimiĝis eĉ kiam la homoj paŝis tuj apude. Ho, la pacaj birdoj, en la paca lando, kun la pacama popolo! Mi estis ravita de tiu ĉi surtera paradizo!

Kontenta kaj feliĉa mi revenis al la hotelo, forte enspirante la freŝan aeron de la hela vespero. Kamaradoj de la ĉina delegacio demandis min kie mi estis posttagmeze. Mi respondis: Mi estis kun moskvanino; ni parolis Esperanton kaj promenis tra la urbo. Ili tre miris kaj ĵetis al mi enviajn rigardojn.

La 28-an de julio okazis la solena inaŭguro de la Festivalo. Matene, ni festivalantoj el ĉiuj partoj de la terglobo kolektiĝis en la Agrikultura Ekspoziciejo. Je la 12-a horo, centoj da senkovrilaj aŭtoj nin portis al la Centra Lenin-Stadiono, malrapide moviĝante tra la homa svarmo kiu plenigis la stratojn por nin saluti. Huraĵoj, kantoj, ridoj, aplaŭdoj . . . formis grandiozan koncerton de ĉirkaŭ du milionoj da personoj. Mi senĉese svingadis la florojn tenatajn en la manoj por respondi iliajn salutojn, ĉar laŭte krei mi jam ne povis pro raŭkiĝo.

Posttagmeze je la 4-a, ni atingis la stadionon kaj estis pretaj eniri en ĝin. Ĝuste en tiu momento norvega knabino, starante apude en la vicoj de sia delegacio, min subite alkriis: "Esperanto!" ekvidinte la verdan stelon kiun mi portis sur la brusto. Mi tuj min turnis kaj kuris al ŝi. Mi serĉadis dum la tuta tago esperantistojn, sed ne atendis ke mi renkontos unu ĉi tie!

Dank' al mia verda stelo, mi renkontis poste ankoraŭ du esperantistojn en aŭtobusoj: unu el Okcidenta Germanio, alia el Svedio.

La Prepara Komitato de la VI Festivalo organizis kelkajn ekskursojn kaj rendezuojn de esperantistoj krom la oficiala renkontiĝo. En tiuj okazoj mi konatiĝis kun krom Sovetiaj ĝesamideanoj ankaŭ kun tiuj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Holando, Japanio, kaj multe da aliaj landoj.

La oficiala renkontiĝo de esperantistoj okazis je la 9-10a de aŭgusto en la Centra Ŝakista Klubo. La kunvenantoj apartenas al diversaj nacioj kaj havas malsamajn religiajn kredojn, vivkutimojn kaj socisistemojn, sed el la paroloj de la reprezentantoj oni vidas la komunan aspiron al la paco kaj amikeco, kiu nin kunvenigis ĉi tien el ĉiuj anguloj de la mondo. Nun, pere de Esperanto kaj dank' al la Festivalo kaj la renkontiĝo, ni pli bone nin komprenas unu la alian; ni pli klare vidas la neceson de la paco kaj amikeco kaj decidis klopodi per ĉiuj fortoj por ilia plifirmigo. Pro tio, ne estas hazarde, ke ĉiuj partoprenantoj de la renkontiĝo senescepte voĉdonis per manleviĝo por la Apelo, kiu plene spegulas la pacdeziron de la tutmonda Esperanta junularo.

Ni havis ankaŭ kulturalan programon, t.e. projekcio de du Esperantaj filmoj, Esperanta koncerto, dancoj, kolektiva partopreno en la karnavalo. Bulgara k-do N. Nikolov montris sin sperta organizanto de amuzado. En la karnavala nokto li gvidis nin kanti, danci kaj ludi en Gorkij-parko de Kulturo kaj Ripozo. Ni formis cirklon en kiu Nikolov laŭte klarigis al ni kiel ludi. Tio multe altiris la atenton de la neesperantista publiko kiu,



“Por paco kaj amikeco!” (Foto de V. Sobolev)

ne povante deteni sian scivolemon kaj ludemon, ankaŭ aliĝis al niaj vicoj.

La 9-an vespere, post la rigardo de la du Esperantaj filmoj, ses Sovetiaj geesperantistoj, unu ĉeĥoslovaka, unu sveda, unu japana kaj mi kune vizitis la hejmon de Profesoro Bokarev. Li forestis pro kunveno. Lia filino Mila gastigis nin per bongusta vespermanĝo. I.a. ŝi montris al ni originalan leteron de D-ro L. L. Zamenhof skribitan je la 29-a de jan. 1909 el Varsovio. La inko jam iom paliĝis, sed la literoj restis klare videblaj.

Legante la leteron de Zamenhof, mi ekpensis pri lia genia kreaĵo. Ĝi vere estas viva ekzistaĵo kiel konstatis iu respondeculo de la Internacia Prepara Komitato post sia ĉeesto en nia renkontiĝo. La interŝanĝado de ideoj inter la esperantistoj iris tiel nature kaj senĝene ke mi ofte ne plu rimarkis kian lingvon mi parolas, kvazaŭ mi estus konversacia kun ĉinoj per ĉina lingvo.

La Festivalo fermiĝis je la 11-a de aŭgusto. Mi estas feliĉa ke mi vivis kun la granda Sovetia popolo kaj ke mi konatiĝis kun novaj sed jam intimaj geamikoj de la mondo. “Se la festivalo okazus ĉiujare!” — esperas miaj geamikoj kaj mi. Jes, niaj koroj restos ligitaj por ĉiam, kaj nia amikeco floros inter la junularo sur la tuta terglobo.

A P E L O

La junaj esperantistoj el kvin kontinentoj, partoprenantaj en la VI-a Tutmonda Festivalo de la Junularo kaj de la Studentoj por Paco kaj Amikeco dum sia renkontiĝo (la 9-an kaj 10-an de aŭgusto 1957 en Moskvo) pridiskutis la temon: “La rolo de Esperanto en la proksimiĝo de la popoloj kaj en la defendo de l' paco”.

La partoprenantoj de la renkontiĝo estas kontraŭ kia ajn rasa, lingva kaj religia diskriminacio; ili aktive subtenas la ideon de paca kunekzisto kaj nacia sendependeco de ĉiuj popoloj, subtenas la kampanjon por tuj malpermeso de la nukleaj armiloj kaj por la reduktado de la diversspeca armilaro.

En la hodiaŭa vivo la junularo ludas ĉiam pli gravan rolon por plifirmigi la interpopolan solidarecon, pacon kaj amikecon. Por la plena efektiviĝo de tiu rolo estas necesa aktiva internacia kunagado de la junularo en ĉiuj sferoj de la socia vivo; la internacia neŭtrala lingvo Esperanto ĉirilate havas gravan signifon kiel praktika rimedo por faciligi senperajn kontaktojn inter ĉiulandaj gejunuloj.

Ni esperas, ke la Tutmonda Federacio de la Demokrata Junularo (TFDJ), la ceteraj internaciaj junular-organizaĵoj, Internaciaj Prepara-komitatoj por sekvontaj Festivaloj de la Junularo kaj de la Studentoj por Paco kaj Amikeco kaj ankaŭ la junulara gazetaro utiligos Esperanton pli kaj pli vaste.

Ni apelas al la junularo en la mondo kaj precipe al partoprenantoj de internaciaj junular-renkontiĝoj studi kaj uzi Esperanton por plifirmigo de paco kaj amikecaj kunligoj inter la junularo tutmonda.

Altiĝas Vivnivelo

Vivnivelo de Laboristoj En 1929-1930, la Kuomintanga Socia Buroo de Ŝanhaja Magistrato faris enketon pri la vivstato de 305 laboristaj familioj kaj en la dokumentoj estis jenaj priskriboj: "Se la familioj sin vivtenus nur per la salajro, do ok aŭ naŭ dekonoj de ili havas deficiton, kaj se oni enkalkulas la krom-enspezojn de tiuj familioj, do du trionoj el ili ne havas sufiĉan enspezon por kovri la necesajn elspezojn." "22.2% de la elspezita monsumo estas prunte prenita je alta interezo", "kaj el la laboristaj familioj 88.2% estas ŝuldantoj kaj 76% el ili devas ofte viziti lombardejojn", "La monata rentumo de hipotekejoj kaj lombardejoj estas ĉirkaŭ 2 procentoj, kaj la monata procentego ĝenerale superas 10 procentojn. Kaj la laboristoj devas prunte akiri monon plejparte je procentego." En la dokumentoj troviĝas ankaŭ jena ekzemplo: En iu laborista familio estis 4 membroj, el kiuj 3 laboris kaj ili enspezis entute pli ol 40 jŭanojn en ĉiu monato, sed pro la subita morto de la patro, ili prunte prenis monon de procentegisto kaj ekde tiam ĉiumonate ili devis pagi al la procentegisto pli ol 30 jŭanojn kiel interezon. Do ilia enspezo "sufiĉis nur por pagi la interezon, kaj nenio restas por la vivtenado". Tial ankaŭ la enketa raporto Kuomintanga devis konfesi, ke tiam la laboristoj "vivas ege mizere pro la ekspluatado kaj jam droniĝis en abismon."

Ŝanhajo estis urbego kun centrigitaj industrioj, kie la laborista movado pli disvolviĝis, kaj tiam la vivnivelo de Ŝanhajaj laboristoj estis multe pli alta kompare kun tiu de alilokaj laboristoj. Se la Ŝanhajaj laboristoj "jam droiĝis en abismon", do estas facile imageble kiel suferis tiam la alilokaj laboristoj tra la tuta lando.

Kaj kiel estas nun?

Jen kelkaj vortoj el la parolado de Ĉefministro Ĉou En-laj: "Dum la sep jaroj ni jam havigis profesion al 13,000,000 senlaboruloj. Tia afero ja neniam okazis en la historio de malnova Ĉinio. En 1952 la meznombra salajro de la tutlandaj laboristoj estis 446 jŭanoj kaj en 1956 ĝi jam altiĝis ĝis 610 jŭanoj. En nur kvar jaroj la salajro estis jam altigita preskaŭ je 37%. Tia rapideco de salajraltigo ankaŭ neniam estis en la historio de malnova Ĉinio." Kompreneble la plibonigo de la vivstato de ĉinaj laboristoj ne estas limigita en tio, jen kelkaj aliaj ekzemploj: dum 1952-1956 nia registaro konstruis loĝejojn ĝis pli ol 70,000,000 kvadrataj metroj; de januaro ĝis junio de 1956, tra la tuta lando en 1,678 fabrikoj kaj minejoj 60,200 laboristoj

konstruigis por si loĝejojn sub la helpo de la registaro. En 1951 la registaro publikigis la Regulojn de Labor-Asekuro, laŭ kiu en la entreprenoj de fervojo, marnavigado, poŝto, telegrafo kaj fabrikoj kaj minejoj kun pli ol 100 laborantoj tra la tuta lando Labor-Asekuro devas esti praktikata. En 1951 estis 2,600,000 laboristoj kiuj profitis de la labor-Asekuro kaj en 1956 jam 7,410,000. Ankaŭ la kultura nivelo de laboristoj videble altiĝis kaj nun pli ol 2,000,000 laboristoj jam liberigis sin de analfabeteco.

Oni povas fari komparon de la konsumaj kvantoj de la laboristoj. Laŭ la statistikoj pri la konsumkvanto de laboristoj en la libro "Vivnivelo de Ŝanhajaj Laboristoj" eldonita de la Socia Buroo de Ŝanhaja Magistrato de Kuomintanga reĝimo, kaj la lasttempa enketo de la Ŝtata Statistika Buroo pri 5,793 laboristaj familioj en 27 urboj tra la tuta lando (Pekino, Tianzin, Mukdeno, Kantono, Uhan, Ĉungking, Ŝi'an k.a.) la konsumkvantoj de la laboristoj estas jene:

	1929-1930 (Ŝanhajo)	1956 (27 urboj)	Plimultiĝo
Grenaĵo (en ĝin-oj)	272.6	331.89	21.7%
Porkaĵo (en ĝin-oj)	8	11.53	44.1%
Legomoj (en ĝin-oj)	—	218.76	—
Kotona ŝtofo (en futoj)	16.38	35.06	115.3%

La supra tabelo montras, ke sub la Kuomintanga reĝimo la ĉinaj laboristoj suferis malsaton kaj frostigon, sed post la liberiĝo, sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio la laboristoj vivas multe pli bone. Multaj laboristaj familioj ne nur povas aĉeti pli multe da viando, sed ankaŭ havigis al si biciklojn, kudromaŝinojn, radiaparatojn, horloĝojn k.t.p.

Vivnivelo de Ĉinaj Terkulturistoj Dum la Kuomintanga reĝimo, 90% el la kamparanoj posedis nur 20-30% el la tuta areo de agro kaj la aliaj 70-80% apartenis al la bienuloj kaj riĉaj kamparanoj, kiuj estis nur 1% laŭfamilie kaj 10% laŭpersone el la kampara loĝantaro. La senteraj kaj termankaj terkulturistoj farmis teron de la bienuloj aŭ riĉaj kamparanoj kaj ĉiujare devis doni 60,000,000,000 ĝinojn da greno kiel renton kaj krome ili ankaŭ devis ŝultri aliajn super-ekonomiajn ekspluatadojn. Tiam la suma kvanto de greno forrabita de la bienuloj, procenteguloj kaj la reakcia registaro for de la malriĉaj kaj dungitaj terkulturistoj atingis ĉirkaŭ 70% de ilia ĉiujara neta enspezo. Laŭ enketaj dokumentoj de la Ekonomia Instituto de la Ĉina Scienca Akademio, en 1936 la meznombra po-persona elspezo ĉiujara de la bienuloj kaj riĉaj kamparanoj estis 397.6 jŭanojn, sed tiu de kvinmembra terkulturista familio estis nur 61.20 jŭanoj. La diferenco estas tre okulfrapa.

Kia estas la vivstato de la ĉinaj terkulturistoj post la liberiĝo? Ja estas konate, ke pro la venko de la agrara reformo, ĉirkaŭ tri cent milionoj da senteraj kaj termankaj terkulturistoj ricevis jam 700,000,000 muojn da tero, kaj forigis de siaj ŝultroj la pezan ĉarĝon de 60,000,000,000 ĝinoj da rentpago.

De 1950 ĝis 1956, por akvokonservado, helpo al plago-damaĝitaj distriktoj, la disvastigo de novtipaj terkulturaj instrumentoj kaj la altiĝo de produkta tekniko, la ŝtato jam elspezis sume pli ol 5 miliardojn da jŭanoj, kaj kiel agrikulturan krediton la ŝtato disdonis okcent miliardojn da jŭanoj por krei favorajn kondiĉojn por la disvolvo de terkultura produktado. Ĉefministro Ĉou En-laj diris: "La suma valoro produktita de la agrikulturo de nia lando kreskadas ĉiujare. En 1949 ĝi estis 32,600 milionoj da jŭanoj kaj en 1956 ĝi kreskis ĝis 58,300 milionoj da jŭanoj, t. e. 79 procentojn pli multe ol 1949. Sekve de la produkta kreskado ankaŭ la aĉetpovo de la terkulturistoj multe altiĝis. En 1950 la aĉetpovo de la tutlandaj terkulturistoj estis 8,100 milionoj da jŭanoj kaj en 1956 ĝi altiĝis ĝis 19,100 milionoj da jŭanoj. Kompare kun 1950 la altiĝo estas 136%. . . . Tiel grandskala plimultiĝo de produkto kaj konsumo de la pli ol 500 milionoj da terkulturistoj ja neniam okazis tra la tuta historio de malnova Ĉinio."

Sube estas statistiko pri la altiĝo de meznombra konsumkvanto de ĉinaj terkulturistoj dum lastaj kelkaj jaroj:

(La ciferoj montras la meznombbran ĉiujaran konsumkvanton de ĉina terkulturisto.)

	1949	1956	Plimultiĝo
Grenaĵo (en ĝinoj)	276	425	53.98%
Vegetaĵa oleo (en ĝinoj)	1.7	3.8	123.53%
Porkaĵo (en ĝinoj)	6.9	7.7	11.59%
Salo (en ĝinoj)	8	11	37.5%
Sukero kaj konfitajoj (en ĝinoj)	2.6	7.7	196%
Ŝtofo kaj ŝtofaĵoj (en futoj)	6.9	20	189.8%

Estas necese rimarkigi, ke la meznombraj ciferoj de 1949 estis kalkulitaj inkluzive la bienulojn kaj riĉajn kamparanojn. Se oni kalkulus nur la konsumkvanton de la ordinaraj terkulturistoj, la ciferoj certe pli malgrandiĝus.

Kultura Vivo Sekve de la plimultiĝo de enspezo kaj pliboniĝo de la materia vivstato de la laboristoj kaj terkulturistoj, pli kaj pli boniĝis ankaŭ ilia kultura vivo. Ekzemple jam multe kreskis la nombro de studentoj kaj mezlernejoj el laboristaj kaj terkulturistaj familioj kiel la jena tabelo montras:

	1952	1956	Plimultiĝo
La Tuta Studentaro (en miloj)	194	408	110.3%
La Studentoj el Laboristaj kaj Terkulturistaj Familioj (en miloj)	40	139	247.5%
Iliaj Procentoj en la Tuta Studentaro	20.5%	34.1%	—
La Tuta Mezlernejanaro (en miloj)	3,150	6,010	91%
La Mezlernejanj el Laboristaj kaj Terkulturistaj Familioj (en miloj)	1,780	3,960	122.5%

Iliaj Procentoj en la Tuta Mezlernejanaro

56.6% 65.9%

La ciferoj en la supra tabelo klare montras al ni, ke dum la pasintaj 4 jaroj la altlernejaj studentoj el laboristaj kaj terkulturistaj familioj pli multiĝis je ĉirkaŭ 2.5 obloj; kaj la mezlernejaj lernantoj el laboristaj kaj terkulturistaj familioj pli-ol-duobliĝis. En la jaro 1956, triono de la studentaro kaj du trionoj de la mezlernejanaro estis el laboristaj kaj terkulturistaj familioj. Tio ja neniam okazis en la historio de malnova Ĉinio.

* * *

La supre menciitaj faktoj pruvas, ke la vivnivelo de la ĉinaj laboristoj kaj terkulturistoj multe pli boniĝis. Kvankam tia vivnivelo estas ankoraŭ malalta kompare kun tiu de la industrie progresintaj landoj, tamen ĝi estas senprecedenca en Ĉinio. La t. n. prosperaj epokoj en la historio de Ĉinio ekz. tiu de Tang-dinastio (618-907 p.K.) kaj tiu de Ĉing-dinastio (1636-1911 p.K.) estiĝis nur post cent jaroj de la fondiĝo de la respektivaj dinastioj, dum la nuna prospera epoko jam komenciĝis nur 7 jarojn post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

La pliboniĝo de la vivo de la popolo ja dependas de la kreskado de la produktivo, kaj nun tre rapide kreskadas nia industria produktivo. Kvankam ne malmultaj estas la malfaciloj en la industriigo de Ĉinio, tamen ni firme kredas, ke dank' al la brava penlaborado kaj ŝparema akumulado de kapitalo fare de nia popolo, senĉese pligrandiĝos nia socia produktivo kaj sekve de tio pli multe boniĝos la vivo de niaj laborantaj popolanoj.

Zekun



Du Porkidoj Lignogravuraĵo de Ling Ĉen

La Produktado de Ĉinaj Metiartajoj

Ekstrakto de Parolado de Baj Ĵu-bing ĉe la Tutlanda Konferenco de Reprezentantoj de Metiartistoj*

Gloraj Historio sed Tragika Situacio Nia metiarto, havanta longdaŭran historion kaj altan nivelon, estas kristalo de saĝeco de niaj laborantaj popolanoj kaj fiero de nia nacio.

En malnova Ĉinio metiarto ne ricevis decan atenton. Precipe antaŭ la liberigo, la metiartaj profesioj pli kaj pli malprosperiĝis pro la imperialisma invado kaj Kuomintanga reaktia regado. Ne povante sin vivteni per sia arto, multaj metiartistoj devis ŝanĝi sian profesion kaj serĉi alian vivrimedon. Ili vivis tre mizere kaj ĉiam suferante malsaton, malvarmon kaj maldolĉon de vagulo. La produktado de la famaj Honan-provincaj ĝiun-porcelanaĵoj de la kvin famaj fornoj fonditaj en la dinastio Sung (960-1279 p.k) devis ĉesi dum la rezistmilito (1937-1945). En la jaro 1949 la produkta kvanto de porcelanaĵoj de nia fama porcelan-urbo Ĝingdeĝen egalas nur trionon de tiu de la jaro 1939. En la jaro 1900, la Pekinaj jadaĵfarejoj nombris pli ol 500, sed en 1942 restis nur tridek kelkaj. En la pasinteco inter la Pekinaj jadaĵistoj popularis diro: "Kiu malbontraktis siajn gepatrojn en la antaŭa vivo, tiu laboras orajeste aŭ jadaĵiste en la nuna vivo". Kaj inter la metiistoj de Ŝiang-brodaĵo de Hunan-provinco popularis simila diro: "Pli bone pendigi pajlsandalojn ol Ŝiang-brodaĵon en la salono." Tiuj diroj plene spegulis stagnon de tiamaj metiartoj kaj la tragikan situacion de la metiartistoj. Sed malgraŭ tio, la plejparto de la metiartoj kiuj reprezentas la eminentan tradicion de nia nacia kulturo, estas konservata dank' al la malfacila batalo de sennombraj metiartistoj.

Koopero kaj Prospero La granda venko de la ĉina popola revolucio alportis brilan estontecon al ĉiuj produktadoj de nia lando, kaj ĝi ankaŭ malfermis vastan perspek-

tivon por la metiartoj. Ricevinte materialojn kaj diversflankajn helpojn multaj metiartistoj revenis al siaj profesioj, kiujn ili antaŭe devis forlasi; la produktado kaj vivo de multaj metiartistoj pliboniĝis kaj rekomencis produkti multaj forgesitaj famaj metiartajoj. Ekzemple, la ĝiun-porcelano de Honan-provinco, klaŭzono de Pekino, bambu-filamentaĵoj de Unĝoŭ-gubernio, Ĉekiang-provinco, arĝent-filamentaĵoj de Ĉengtu, artaĵoj el krizantem-ŝtono** de Liujang, Hunanprovinco kaj aliaj metiartajoj—ĉio ĉi tio rekomencis produktiĝi post la liberigo.

En la printempo de 1956, en festa tamtamado kaj tamburado tra la tuta lando la plejparto de la metiartistoj organiziĝis en kooperativoj kaj ĝoje surpaŝis la socialisman vojon. Ĝis la fino de 1956, en la tuta lando jam organiziĝis entute 5,400,000 metiistoj el kiuj 760,000 metiartistoj organiziĝis en 2,300 kooperativoj kaj kooperaj grupoj, t.e. 98.6 procentoj de la metiartistaro. Krome, ankaŭ multaj kamparanoj sin okupas per metiartoj kiel plektado de tritika pajlo por ĉapeloj, brodado, punto-farado, plektado de kanabĉapeloj k.t.p.


Partopreninte diversformajn kooperativojn, la metiartistoj en la tuta lando liberiĝis por ĉiam el ekspluatado kaj surpaŝis vastan vojon de socialismo. Nur unu jaron post sia organiziĝo la metiartaj kooperaj organizoj jam manifestis grandan superecon en diversaj flankoj.

Post organiziĝo de metiartistoj la produkto de metiartajoj tre rapide disvolviĝas. En la jaro 1956 la metiartajoj produktitaj de la profesiaj metiartistoj de nia lando valoras 170,000,000 juanojn (inkluzive de la metiartajoj, libertempe produktitaj de kamparanoj, ili valoras 270,000,000 juanojn), t. e. 2.5-obliĝis kompare kun tiu de 1952. En la jaro 1956, la porcelanaĵoj de la fama porcelan-urbo Ĝingdeĝen 2.9-obliĝis laŭvalore ol tiuj produktitaj en la jaro 1952. La ŝiang-brodaĵoj de la provinco Hunan produktitaj en 1956 31-obliĝis ol tiuj produktitaj en 1952 laŭvalore. La produktado de ambaŭ menciitaj metiartajoj jam superis la plej altan nivelon antaŭ la Kontraŭjapana Rezistmilito. Post kooperiĝo, la metiartistoj de lakaĵoj en la gubernio Jangŝoŭ ne nur komencis produktadon de multaj altvaloraj artaĵoj, sed ankaŭ kreis pli ol cent novajn specojn de metiartajoj kiel bambuinkrustaĵoj, lakaj bildekranoj murornamaj k.a. .

Organiziĝinte la metiartistoj akiris pli bonan kondiĉon por kreado, reciproka lernado kaj komuna altigo de arta nivelo. En multaj fundamentaj kooperativoj organiziĝis artostudaj grupoj. Unu post aliaj stariĝis metiart-studaj organizoj en Pekino,

Grilo kaj Manto

Termodlaĵo



Ŝanhajo, Nanking, Kantono, Suĝoŭ, Fuĝoŭ. Ĉungking, Ujfang kaj aliaj urboj. Post la starigo de tiaj organizoj en Pekino kaj Ŝanhajo jam 58 veteranaj metiartistoj estis invitatitaj al ili kiel studentoj. En la pasinta pli ol unu jaro, la arto-studa laboratorio en la urbo Fuĝoŭ kreis pli ol 250 novajn metiartaĵojn. Krome la metiartistoj en diversaj lokoj ankaŭ faradas intervizitojn, diversmaniere riĉigas siajn vivspertojn por altigo de sia artnivelo. Eminentaj kreaĵoj de multaj metiartistoj estas ekspoziciitaj kaj pritaksitaj. El elefanta dento pezanta je 130 ĝinoj Jang Ŝihuj kaj 6 aliaj metiartistoj elskulptis ĝojan scenon de la Pekina popolo festanta la publikigon de la konstitucio kun la panoramo de Bejhaj-parko kiel fono. Se la metiartistoj ne organiziĝus, estus neimageble krei tian artaĵon. Tio ja klarigas la avantaĝon de kooperiĝo.

Post la organiziĝo pli kaj pli multiĝas novaj kaj junaj metiartistoj dank' al instruado de spertaj metiartistoj. Ekzemple en la urbo Uŝi, Ĝiangsu-provinco, elbakiĝis 40 metiartistoj de Hujŝan-aj termodlajoj. En la jaro 1956, 138 metiartaĵoj estis varbitaj por 13 profesioj en la urbo Suĝoŭ. En 11 kooperativoj en tiu urbo metiartaĵoj kaj lernantoj kontraktis 152 kontraktojn de instruado kaj lernado, kaj oni konstatis post kontrolo ke ĉi tiuj kontraktoj bone efikis. Multaj artistoj jam fariĝis modeloj de fervoraj metiartaĵoj instruantoj. En la malnova Ĉinio, pro ekzisto de ekspluata reĝimo, vivteno de la metiartistoj estis sengarantia kaj tiam popularis proverboj: "La lernanto ellernas, la mastro malsatmortas" kaj "Samprofesiuloj estas malamikoj", "Viziti estas permesate, rigardi la produkton proceson estas malpermesate", "Naski filojn por generado, sekretiĝi arton por vivtenado" kaj "Arton instru al filoj, sed ne al filinoj". En nova Ĉinio la reĝimo de ekspluato estis forigita, kaj la vivo de la metiartistoj estas garantiata, tial multaj metiartistoj publikigis siajn unikajn artojn kaj senrezerve instruis siajn lernantojn, por ke ili ellernu la artojn.

Post organiziĝo la produktado reguliĝis, la vivo de la metiartistoj pliboniĝis kaj iliaj politika pozicio ankaŭ plialtiĝis. En 1955 la meza salajro de la kooperativanoj en la tuta lando plialtiĝis je 165 procentoj kompare kun tiu de 1952. Post reguligo de salajro en la jaro 1956 ĝi pli altiĝis. Laŭ statistiko pri la salajroj de 1563 membroj de 12 kooperativoj en Suĝoŭ, ilia meza salajro plialtiĝis je 21 procentoj kompare kun tiu antaŭ la reguligo. Ne malmulte da kooperativoj starigis labor-asekuran sistemon por plibonigi la vivstaton de la laborantoj. Maljunaj kaj malfortaj metiartistoj en multaj lokoj ĝuas apartan prizorgon. En iuj lokoj metiartistoj havas siajn reprezentantojn en kongresoj de popolaj reprezentantoj kaj politikaj konsiliĝaj konferencoj. En iuj lokoj kunvokiĝis ankaŭ kunsidoj de reprezentantoj de metiartistoj. En tiaj kunsidoj la reprezentantoj de metiartistoj interkonsiliĝis pri disvolvo de loka metiarta produktado kaj trovis taŭgajn rimedojn por la disvastigo. Tio ja neniam okazis en la pasinteco.



Post 30-jara intervalo majstro de ferbildoj rekomencis sian metion

(Foto de Ĉeng Ĝia-kaj)

Metiartaĵoj Plibeligas la Vivon de la Popolo kaj Subtenas la Landan Konstruadon

La metiartaĵoj havas ambaŭ ekonomian kaj artan valorojn. Ĝenerale ili klasifikigis en du specojn, nome

artaĵoj por ĉiutaga uzo kaj artaĵoj por ornamo. Ĉi tiuj metiartaĵoj, plejparte produktitaj de polanoj, havas grandan popularecon kaj bone plenumas la postulon de vastaj popolamasoj por plibeligo de vivo.

La metiartaĵoj de nia lando ankaŭ estas por eksporto. La metiartaĵoj eksportitaj dum la periodo de 1950 ĝis 1958 valoris pli ol 330 milionojn da jŭanoj. Tio ebligis al ni akiri pli da fremda mono por subteni la landan konstruadon.

En la pasintaj 7 jaroj niaj metiartaĵoj estis ekspoziciitaj 61 fojojn en 27 landoj, ilin rigardis 34 milionoj da personoj, kaj ilin laŭdis multaj fremdaj amikoj. En internacia teknika interŝanĝo la Prepara Komitato de Tutlanda Administrejo de Metiaj Kooperativoj pretigis teknikajn materialojn pri produkta proceso de 14 specoj de metiartaĵoj por 6 frataj landoj. Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, Polio, Mongolio kaj aliaj landoj ankaŭ sendis delegaciojn por pristudi la produktadon de niaj metiartaĵoj. Mongolio, Vietnamo, Koreio Albanio kaj Birmo eĉ sendis lernantojn por lerni produktadon de niaj metiartaĵoj. Ĉio ĉi tio ludas aktivan rolon por akceli internacian interŝanĝon de ekonomio kaj kulturo kaj por plifirmigi solidarecon kaj amikecon inter la popoloj en la mondo.

Elĉinigiĝis Ĝ.

* Baj Ĵu-bing—estro de la Centra Administrejo de Metiaj aferoj kaj estro de la Prepara Komitato de Tutlanda Meti-kooperativa Oficejo.


**Ŝtono kun natura desegno de krizantemo.

EKDE la tempo kiam mi surpaŝis la teron de Egiptio, mi vidis sablon, sablon, vastajn etendajojn de dezerto, blankajn sub la lunlumo, kvazaŭ kovritajn de neĝo aŭ prujno. Iam, kiam subiras la suno ĉe la ĉielrando, vi povas vidi aron da ŝafoj kaj kelke da kameloj sin paŝantaj dise en la brilo de la vespera suno. Portante blankan turbanon sur la kapo kaj larĝan blankan robon sur la korpo, iu egipta paŝtisto estas blovanta kontraŭ la vespera venteto dutuban kanfluton, kies melan- kolia tono igas la aŭskultantojn neeviteble pripensi siajn familianojn milojn da mejloj forajn.

Sed la dezerto ankaŭ havas sian mirindan flankon. Iufoje mi veturis de Aleksandrio ĉe la bordo de la Mediteraneo al Kairo. Kiam survoje mi malfermis fenestron de la aŭtomobilo, malvarma venteto ekblovis sur mian vizaĝon: strange, kia aromo! Tuj alproksimiĝis al la veturilo de vojflanko du-tri knabinoj portantaj grandajn faskojn da floroj, flavaj, purpuraj aŭ helruĝaj, kies nomojn mi eĉ ne konas, kaj baris la trapason de nia aŭto vendkriante. Rigardante tra la fenestro eksteren, mi vidis, ke ĉie estas dezerta sablo kaj apenaŭ estas trovebla ia verda koloro. De kie venis la floroj?

Estas ja esplorinde, ĉu ankoraŭ ekzistas io sekreta en la profundo de la dezerto.

Foje mi faris tian esploron. Ekirinte de Kairo nordokcidenten, mi veturis rekte en la okcidentan dezerton. Pro subita forlaso de homplena, prospera urbego, des pli sentis mi la solecon de la dezerto. Ie troviĝas kelkaj tufoj da sabloherboj. Oni ne povas diri ĉu ili estas grizaj aŭ verdaj, sed ĉiuj aspektas ege velkaj. Animaloj estas ankaŭ troveblaj. Krom leporoj estas ankaŭ tre lertaj birdetoj, kies koloro estas kiel tiu de la sablo kaj kiuj kuras rapidege. Mi ne scias, kion ili povas trovi en la dezerto por manĝi.



Ŝanĝiĝas la trajto de la dezerto en la Liberiĝo-provinco dank' al la penlaboro de la diligentaj egiptoj

(Foto de Ŝinhua-novaĵagentejo)

Jang Ŝuo

La Rozo en la

Iom post iom la aspekto de la dezerto ŝanĝiĝas: ĉie vidiĝas verdaj punktoj kaj ĉe ambaŭ flankoj de la ŝoseo estas plantitaj du vicoj da arbidoj, altaj je du-tri futoj. Oni diras, ke fluidan medikamenton dekoktitan el iliaj branĉoj kaj folioj timas plej multe la moskitoj. Tial ni nomas ilin moskit-arboj. La aŭtomobilo sin turnis kaj kontraŭvizaĝe aperis granda ligna tabulo blukolora, sur kiu estas surskribitaj horizontale de dekstre maldekstren arabaj vortoj: "Paradizo en la Dezerto."

Enirinte la "paradizon", mi vidis, ke la ĉirkaŭaĵo tie pli verdas kaj plenplenas de vivforto. Subite antaŭ la okuloj aperis mirinda loko: puraj helaj domoj, travideble klaraj lagetoj, veluraj herbejoj kaj florbedoj kun plene florantaj begonioj.

Efektive mi jam alvenis al la konata "Liberiĝo-provinco" de Egiptio. Tie ĉi estas ĝia ĉefurbo. La administranto de la Departemento de Publikaj Rilatoj bonvenigis la gaston en sian oficĉambron. Li estas nomata Rachid, proksimume tridekjara, kun petola liphararo sur la supra lipo. Li ankaŭ parolas petoleme. Verŝajne gasto el Azio pli plezurigis lin. Manfrotante kvazaŭ li sentus malvarmon, li demandis: "Kiel, amiko? Ĉu la dezerto iom plaĉas al vi?"

"Tian dezerton mi ja ŝatas," mi respondis.

"Eksciu, amiko," diris Rachid ridante, "ke tia dezerto estas reakirita el la manoj de sovaĝaj malamikoj." Montrante al mi la animalan fosilion ekspoziciatan sur tablo, li daŭrigis: "Tio estas mamuto vivanta en la pratempo kaj elfosita el la ĉitiea ĉirkaŭaĵo. Ĝi devas esti la reĝo de la dezerto antaŭ miloj kaj miloj da jaroj. Se vi venus tien ĉi antaŭ tri jaroj, vi povus vidi nenion krom piedsignoj de kameloj, sed hodiaŭ....."

Sed nun reĝas en la dezerto la homoj. Tamen la historio de la reĝado estas ankoraŭ tre mallonga. Nur en junio de 1954, kiam oni sentis, ke sin trovas tro multe da dezertoj en Egiptio dum la nombro de la loĝantoj kreskas tre rapide, oni ekatakis la dezerton. Tuj ĉe la komenco Rachid partoprenis la ekspedicion por venki la dezerton. Li estis

Araba Dezerto

profesie advokato kaj vivis sufiĉe bone, sed li preferis vivi kun la sablovento kaj bruliga suno.

“Mi amas la dezerton ĝis freneziĝo”, diris Rachid ridante. “Sen ŝi eĉ unu tagon mi ne povus vivi.”

“Zorgu,” mi admonis ankaŭ ridante, “ke via edzino ne subaŭskultu vian parolon. Alie ŝi ĵaluzos.”


Rachid ekpaŭtis kaj diris: “Ĉu ŝi ĵaluzos? Estas jam bone, se mi ne ĵaluzas. Lasu min diri al vi la veron. Ekde la tago, kiam mi alvenis tien ĉi, mi edziĝis al la dezerto dediĉante al ŝi mian tutan korpon kaj animon. Sed kiu scias, ke poste ankaŭ ŝi reedziniĝis al Nilo-rivero.” Tion dirante ankaŭ li mem ridis, kaj daŭrigis: “Ni ĉiam diris ke Nilo-rivero estas la favoranto de Egiptio, kiu provizas al ni fiŝojn, rizon, sovaĝajn anserojn..... Tamen neniu povas supozi, kion naskos al ni la dezerto post sia edziniĝo al Nilo-rivero.”

Rachid gvidis min por vidi la produktadon de la dezerto. Tiu ĉi regiono situas proksimume duonvoje de Kairo al Aleksandrio. Ĝia orienta rando estas najbara al la delto de Nilo-rivero. Fluego nomata la “Liberiĝo-kanalo” sin kondukas de Nilo-rivero en la sekegan dezerton, kaj pro tio la dezerto gravediĝas kaj komencas fruktodoni.

Rigardu! Jen estas printempa tritiko, jen fabo, jen indigplantaĵo..... la vastaj etendaĵoj vidiĝas pli ĉarme verdaj kontrastante kontraŭ la blanka sablo ĉirkaŭ si. Mangarboj, orangarboj, tanĝerin-arboj, mandarenarboj, maro, maro da fruktarboj. Kvankam ili ankoraŭ ne atingis sian fruktodonan aĝon, tamen ilin vidante oni jam povas imagi al si la estontajn plenarbojn da orkoloraj fruktoj peze pendantaj. Krome, estas ankaŭ sunfloroj similaj al oraj teleroj, arboj kun foliaro kvazaŭ verda gazo, kaj diversspecaj nekonataj kreskaĵoj. Vidinte ĉion ĉi tion, mi mem mokis en mi pretervole: “Hm! vi ja ĉiam opiniis, ke la dezerto estas sterila loko.”

Mi pripensis eĉ pli multe. Ĉu ni ne diradis: “Estas neeble por kamelo trairi la trueton de kudrilo, nek estas eble konstrui domegon sur la dezerto”? Tamen ili ja konstruis domegojn sur la dezerto. Se vi ne kredas, rigardu la fabrikon de cementtuboj, la kudran fabrikon, la fabrikon de kaŭĉukaĵoj, kaj krome, elektrejon, glacifabrikon, fabrikon de enladigitaj manĝaĵoj, traktorstacion k.t.p. ĉu konstruitajn, ĉu konstruatajn, ĉie videblajn.

Rachid diris al mi, ke tie ĉi jam konstruiĝis kelkaj tute novaj vilaĝoj. Ilia nombro grandiĝos ĝis kelkcent en la estonteco. Tiuj industriaj distriktoj fariĝos la morgaŭaj urboj.



Egipta korboparisto (Foto de *Ŝinhua*-novajagentejo)

Homoj, junaj kaj fortaj, svarmis tien ĉi de ĉiuj anguloj kun arda volo. Prenu Fouad por ekzemplo. Ŝi diris al mi: “De kiam mi diplomitiĝis el la universitato, mi laboris en infanĝardeno en Kairo. Mia edzo estas kuracisto. Anstataŭ resti en Kairo, mi preferis veni tien ĉi. Ni estas tre feliĉaj tie ĉi, ĉar ni scias, ke ni dediĉas nian forton al la estonteco.”

Fouad estas tre kapabla virino, portanta blankan korsajon el lano kaj grizan jupon. El ŝiaj okuloj montriĝis kaj seriozeco kaj mildeco. Ŝi gvidis min viziti iun nove konstruitan vilaĝon. Mi ŝin demandis: “Ĉu vi povas antaŭvidi la de vi priparolitan estontecon?” Fouad nur iom ridetis nenion dirante. Tiam estis tagmezo. Multaj kolektiĝis en la moskeo en la mezo de la vilaĝo. Sidantaj aŭ surgenuaj, ili estis kantantaj la Koranon kaj riverencantaj al la oriento.

“Ili estas preĝantaj por paco,” mallaŭte diris al mi Fouad. Ŝi kondukis min en ekspoziciĉambron, kie estis montrataj bildoj pri ĉiufankaj atingiĝoj en la “Liberiĝoprovinco.” Rigardante la bildon sur la muro kontraŭ ni, ŝi diris ravite kun sonĝaj okuloj: “Ĉu vi vidas? Jen estas nia idealo, nia estonteco.”

Sur la bildo estas pentrita kamparano elvenanta el kaduka terkabano kun manoj levitaj kaj okuloj rigardantaj la ĉielon. Sur la ĉielo estas peco da

nubo, el kiu aperas anĝelo portanta delikatan gazon de flava, blua kaj verda koloroj, viziosimila kaj tre belmiena.

Montrante la pentraĵon, Fouad diris: “Ĝi estas idealo, sed ankaŭ aktualajo. Se vi venos refoje post dek kvin jaroj, vi nepre vidos niajn kamparanojn elirintaj el malriĉeco kaj mizero kaj marŝantaj en la paradizon en la dezerto: flava estas la sablo, blua estas la akvo kaj verda estas la senlime etendiĝanta kamparo — kia bela vidaĵo!”

Krom tio, la egiptoj bone scias kiel krei belecon. Kiam mi estis ĉirkaŭrigardanta en la dezerto, mi ekflaris blovon de floraromo, tre dolĉa kaj intensa. Mi saltis el la aŭto kaj surprizkriis. Pripensu, ke en la mezo de la dezerto sin trovas multo da belegaj rozoj. Ĉu tio ne estas miraklo? La floroj estas multkoloraj: blankaj, helruĝaj, karmezinaj kaj purpuraj, ĉiuj admirinde belaj. Miloĵ kaj miloj da plene aŭ duone florantaj grandaj floroj pendas de la branĉoj, ke ili kurbiĝis sub la ŝarĝpezo.

Inter la floraroj du junaj ĝardenistoj estis trankvile ĉirkaŭtrancantaj branĉojn kaj foliojn.

Ekscitite mi alproksimiĝis kaj ripete diris: “Tre belaj! Vere tre belaj!”

Unu el la ĝardenistoj nomata Atija signifoplene ekridis, detranĉis du purpurajn rozojn kaj transdonis ilin al mi. Mi alpinglis ilin al la brusto kaj diris laŭte: “Mi nepre alportos tiujn ĉi du rozojn al Pekino, por ke ĉiuj ĉinaj amikoj povu vidi — la rozojn en la dezerto.”

Atija rigardis min ridetante kaj nerapideme diris: “Paco al vi!”

Laŭ la kutimo de egiptoj, mi levis la dekstran manon kaj diris al li: “Mi dankas vin. Mi esperas, ke viaj rozoj floros tra la tuta dezerto!”

Palpante sian lipharon, Rachid ridis apude kaj diris: “Estu trankvila, amiko! Tiaj homoj estas kapablaj transformi ĉiun sableron de la dezerto en oron.”

Tio estas ja ne nura humoraĵo. La vilaĝo, kiun Fouad gvidis min viziti, estas nomata “Omal Saŝin.” Ĝi estas la nomo de juna egipta lernanto, kiu oferis sian vivon dum la kontraŭangla lukto eksplodigita de la egipta popolo laŭlonge de Suez-kanalo en 1952 por la sendependeco kaj libereco de sia nacio. Ja neniu en la dezerto volas makuli tiun gloran nomon. La ĉiam vigla batalvolo kaj la kuraĝa sinoferema spirito de “Omal Saŝin” ankoraŭ vivas ĉie — en Rachid, en Fouad, kaj en la juna ĝardenisto. Kion ne povas krei tia popolo?

Mi kunportis la du rozojn kun mi al Pekino kaj metis ilin sur mian skribtablon. La floroj jam fariĝis sekaj, sed pli fortikaj, neniam velkontaj. Kiam mi estis forironta de Egiptio, iu amiko demandis min: “Kia estas via impresio pri Egiptio?” “La rozo en la dezerto,” mi respondis. Kaj ni ambaŭ ridis. Nun skribante tiun ĉi artikolon, mi rigardas tiujn ĉi du rozojn, min kaptas sopiro al miaj geamikoj for en la araba dezerto.

“Paco al vi!”

Tradukita de Cipao Nin

Tjan Ĝjan:

Pizango kaj Sukerkano

*Troviĝas arbeto sukera,
plenplena je suko miela,
necesas nur manon eklevi
por de ĝi donacon ricevi.*

*Ĝi kapon silente klinadas,
per bela florkrono paradas;
ĝi estas juneco, libero,
kunul' de l' patria lim-tero.*

*Kaj dolĉa arbeto alia
similas junaĝan paŝtanton;
kun svingoj de l' brakoj foliaj,
zumadas plezurajn ĝi kanton.*

*Ĝi vestas sin ne per kiraso,
sed per la perloj de roso;
ĝi estas ĝiskore sukera,
ĝi estas rivero miela.*

*Ĉi arboj je dolĉo tre riĉas,
ĉe l' pordo de Mangshi plantiĝas;
maldekstre estas sukerkano,
ĉe l' dekstro, arb' de banano.*

*Ni plantis ĉi arbojn ĉe l' pordo,
ke ili fariĝu pruvvorto:
la fruktoj de ni dolĉ-efikaj
pretiĝas por homoj amikaj.*

Elĉinigiĝis Laŭlum

Inijni



INIJNI estas la vic-vilaĝestro de Maŭmaŭgoŭ-vilaĝo de la Ji-nacia Aŭtonoma Regiono en Hujli-gubernio de Seĉuan-provinco.

La unuan fojon mi renkontis ŝin en la oficejo de la vilaĝ-registaro de la Maŭmaŭgoŭ. Ŝi portis novajn bluzon kaj jupon, brilan perlo-cirkaŭkolan kaj bluan feltan ŝalon. Ŝi facilmove eniris en la pordon min salutante, sinturninte sidiĝis kaj ekridetis.

“He, kamarado el Pekino, kiel ni povas sciigi la fratinojn de la tuta lando, ke ni sklavoj jam estas liberigitaj kaj fariĝintaj mastroj, ke ĉiuj ĝoju pri tio!” ŝi diris.

“Ho, mia bona vilaĝestro, mi longtempe postkuris post via ombro, tamen vi revenis ĉi tien. Iru! Rapidu!” diris iu viro pli ol tridekjara, kiu enrapidis urĝe, kaptis ŝian brakon kaj ektiris ŝin eksteren.

“vi maldiskretulo! vidu, jen estas kamarado el Pekino!” ŝi diris baraktante.

La viro ellasis ŝian manon. Li honteme diris kelkajn vortojn al mi kaj turniĝis al Inijni: “Por solvi la problemon de Ieluni estas necese ke vi iru tuj! Ŝia edzo nepre deziras tuj solvi la problemon kvazaŭ ordigi taŭzitan juton per akra tranĉilo! Ni jam ne scias kion fari!”

“Do solvu, se li volas.”

“Sed ne solvebla! Kaj ni atendas vian iron!”

“Do, ni iru!” ŝi diris kaj turniĝis al mi, “Ni babilu post mia reveno.” Kaj ŝi foriris kune kun la viro.

Jam noktiĝis. Ŝi revenis kun olelampo, ĝin bruligis kaj starante ĝin pendigis alte sur trabo. Tiam ŝi diris: “Homoj estas malsamaj kiel iliaj vizaĝoj. Oni devas frotvundi la lipojn por persvadi tian obstinulon!”

“Ĉu jam solvita?” mi demandis, tamen verdire mi ankoraŭ ne sciis kian problemon ŝi iris solvi.”

“Bonvolu diri, ĉu estas prave tiel solvi la problemon.” Kaj ŝi diris al mi la historion de la komenco ĝis la fino. Ieluni nun estas nur dekokjara. Ŝiaj gepatroj jam mortis antaŭ-longe. Kun la pli junaj gefratoj sub sia protekto, ŝi iĝis sklavo en la hejmo de Suveini. Antaŭ la demokrata reformo, Suveini vende edzinigis ŝin al iu laborulo por 200 arĝentaj dolaroj. Sed ŝi forkuris antaŭ la finiĝo de la nokto en kiu ŝi edziniĝis. Poste ŝi iĝis aktivulino en la demokrata reformo kaj estis promociita kiel provizora kadro en la distrikta oficejo. Nun ŝia

fratino laboras hejme kaj ŝia frato lernas en elementa lernejo por Ji-nacianoj. Hodiaŭ, ŝia edzo trovis ŝin kaj diris al ŝi: “Se vi volas resti mia edzino, do iru hejmen kun mi; alie, redonu al mi ducent dolarojn kaj ĉio finiĝu inter ni.” Ŝi respondis: “Repagon vi postulu de la mastro! Ke mi reiru en vian domon, vi ne revu!” Kaj tiel estiĝis la problemo. La vilaĝestro persvadis la edzon, sed li estis rigida kiel ŝtala lanco. Li nepre deziris tujan solvon. Oni persvadis la edzinon, kaj ŝi diris: “La mono estis pagita al la mastro, mi eĉ moneron ne ricevis! Mi havas mian liberon. Mi volas labori, mi ne reiros en lian hejmon!” La plej malfacila afero estis: postuli ke la mastro redonu la monon, estas kontraŭ la politiko de solidareco kun la sklav-mastroj kaj tion la registaro ne permesas; devigi la edzon forlasi kaj sian edzinon kaj la monon estas neeble; se oni devigus la edzinon reiri al sia edzo, ŝi ne konsentus, kaj krome ree hejmen enfermi kadrinon malbone efektus al la amaso. Sed la edzo rifuzis foriri se oni ne solvis por li la problemon. Li diris: “Se vi vere ne solvos, mi tuj iros por plendi al la distrikta aŭ gubernia registaro. . .” Do, kion fari? Inijni vokis flanken la edzon kaj diris: “Rompi la rilaton estas tre facile, ĉar se oni prunte donus al ŝi du cent dolarojn, ke ŝi repagu al vi, tiam ĉio finiĝos inter vi. Sed vi fakte ne deziras rompi la rilaton. Vi supozas, ke ŝi ne havas ducent dolarojn kaj ankaŭ ni ne havas tiom da mono por prunte doni al ŝi, Vi volas ŝin sufoki per la postulo kaj devigi ŝin reiri kun vi. Bona viro, vi eraras! Vi amas ŝin, sed ŝi vin ne amas. Se vi devigos ŝin reiri al via hejmo, ŝi des pli vin malamos!”

Kial ŝi ne amas vin? Ĉar antaŭe ŝi kontraŭis tiun kiu ŝin vendis, tial ŝi malamis ankaŭ vin, kiu ŝin aĉetis. Krome, vi ŝin batis kaj ŝi ne volis forlasi siajn gefratojn, tial ŝi ne volis vivi kun vi. Nun ŝi liberiĝis, progresis kaj fariĝis kadro. Sed vi? Vi laboras ne aktive kaj progresas malrapide, tamen vi deziras ŝin treni hejmen. Sekve, ŝi ne amas vin. Aŭskultu mian admonon: ĉiam bone ŝin traktu, rapide progresu, bone lernu, modele laboru kaj klopodu por prosperigi la agrikulturan kooperativon, kaj tiel iom post iom akiri ŝian amon. Ne malpacienca, alie vi ne sukcesos. Ĉio dependas de via estonta sinteno. . . .” La edzo iom post iom malrigidiĝis. Ŝi parolis ankaŭ kun la edzino, por ke ŝi laboru trankvile. Finfine, la edzo volonte obeis ŝian vorton kiel knabo kaj hejmen iris. “Tio estas por ilia bono kaj ankaŭ estas rimedo por malstreĉi la situacion. Ni, Ji-nacianoj ankoraŭ ne komencis plenumi la Geedziĝan Leĝon, tial eĉ se ili irus al la distrikta registaro, ili ankaŭ ne trovus tujan solvon. Kiam la edzo fariĝos progresema, tiam la problemo estos pli facile solvebla eĉ se la edzino ankoraŭ ne amos lin. . . .” Ŝi rakontadis kaj ne rimarkis kiam Aructu venis kaj staris apud ŝi.

“Vi estas plenplena de rimedoj! Bone, tia solvo estas bona!” la vilaĝestro Aructu laŭdis ŝin kaj ŝercis. “Sed ĉu via cerbo estis manĝita de hundo, kiam vi solvis vian propran problemon?”

“Aj! kia tempo tiam estis! Tiam la suno ankoraŭ ne leviĝis.” ŝi refutis.

Inijni nun estas tridek-kvar-jara. Same kiel multaj aliaj sklavoj ĉar ŝiaj gepatroj estas geedziĝintaj sklavoj, ŝi estis denaska sklavino. Kiam ŝi estis dekdujara, Juĝinij, filino de la mastro, edziniĝis, kaj ŝi alvenis al la nuna vilaĝo Solidareco kiel dot-sklavino. De tiam ŝi iĝis sklavino en la hejmo de Ĵeleako. Tiam ŝi sopiradis sian patrinon, sian patron, sed barita de kelkaj montegoj ŝi ne povis reiri, tial ŝi ploris gapante al la ĉielo. La mastro ordonis ŝin prizorgi infanon. Ŝi ne povis bone plenumi la taskon, estis batita per bastono kaj ŝi ploris. La mastro ordonis ŝin paŝti ŝafojn. Ŝi ne povis kuratingi la ŝafojn, estis vipita kaj ŝi ploris.

Tri jaroj pasis, ŝi, fariĝis dekkvinjara kaj tiam ŝi jam devis surgrimpi monton por kolekti hejtlignon kaj portadi akvon el profunda valo. Tage ŝi laboris kiel maturulo kaj nokte ŝi ankoraŭ devis mueli por

la mastro. La muelilo estis tro granda kaj ŝi ne povis ĝin movi, tamen ankoraŭ devis ĝin turnadi. Muelinte ĝis noktomezo, ŝi kuŝiĝis surtere apud fajrujo, sin kovris per peco da felo, kaj post momenta dormo, kiam la ĉielo ankoraŭ ne heliĝis, ŝi jam devis leviĝi kaj labori denove. Tiamaniere forpasis jaro post jaro, kaj ŝi atingis la aĝon de edziniĝo. Sed virsklavoj de la mastro estis malmultaj, tial mankis sklavoj por geedziĝi kun ŝi. Se oni edzinigus ŝin al sklavoj de alia mastro, la knaboj naskotaj apartenos al la alia mastro. Ne dezirante tian malprofiton, ŝia mastro ŝin atendigis. Kiam ŝi estis dudek-sep-jara, la mastro devigis ŝin edziniĝi al sklavoj dekelkajara. Ŝi ne volis kaj la mastro batis ŝin. Ŝi ploris kaj rifuzis manĝi. Kaj la mastro? Ankaŭ li ne ĝojis, ĉar li ordonis siajn gesklavojn geedziĝi, sed la sklavino eĉ kuraĝis malobei. Spite al ŝia malkonsento, la mastro buĉis malgrasan laman ŝafon kaj devigis ilin drinki geedziĝan vinon. Por geedzoj devas esti hejmo, do oni devis aranĝi komunan loĝejon por la novaj geedzoj. Sed tiam Ĵeleako ne havis vakan domon, kaj krome ĉar li haste geedzigis ilin pro kolero, do estis neeble konstrui domon en tia hasteco, tial oni nur faris por ili “loĝejon” per bambu-barilo, kiu havis nek tegmenton nek pecon da tabulo kiel plankon. Kaj je la geedziĝa nokto, la mastro ilin dormigis en la bambua ĉirkaŭbarilo. La malgranda Ibiuu foriris ŝtele kaj dormis aliloke. Surtere ŝi dormis sola ĝis noktomezo eĉ pecon da ŝafofelo ŝi ne havis por sin kovri. Kiam la malvarmo fariĝis ne tolerebla, ŝi ŝteliris dormi en bovstalon. Pro doloro de korpo kaj spirito ŝi elverŝis senbrue siajn larmojn ĝis la lasta guteto. Ŝia koro rompiĝis kaj ŝi ne povis ekdormi. “Por kio mi vivas? Por suferi batadon, insultadon, turmentadon kaj labori, laboradi por aliaj ĝis la morto. . . .” tion pensante ŝi venis al la ideo de memmortigo. Ŝi malvolvis de la kapo la eluzitan tukon, kiun la mastro donis al ŝi kiel doton, ĝin pendigis sur trabo, faris maŝon kaj etendis la kapon en ĝin. Ŝi jam estus mortpendigita, nur se ŝi forpuŝus la objekton sub la piedoj. “Ho, panjo, paĉjo, vi vane naskis vian filinon. . . .” ŝi murmuretis el sia koro al la direkto de sia naskiĝloko. Maljuna bovo maĉis herbon. Strigo ululis ekstere. Ŝi faris fortan piedpuŝon, la tuko rompiĝis, ŝi falis sur la teron kaj svenis. Poste, ne sciante kiam, ŝi reviviĝis kaj fuĝis al primitiva arbaro en profunda montaro, frekventata de tigroj kaj leopardoj.

Ŝi ŝtele iris al sia patrino, sed ŝia patrino ne kuraĝis akcepti ŝin. “Reiru, mia kara! vi ja estas ilia sklavino! Por ke via patrino ne estu implikita, por ke vian patron ne ataku malfeliĉo. . . .” diris ŝia patrino verŝante larmojn pluvogute sur ŝian vizaĝon. Ŝi rigardis sian patrinon kun larĝe malfermitaj okuloj kaj demandis: “Kaj se mi mortos?” “Kiel vi povas morti? vi estas mia sola infano!” Finfine ŝi estis resendita kaj vivis kun Ibiuu en tre malgranda kabano.

Post la liberiĝo de la tuta lando kaj fondiĝo de la Ji-nacia Aŭtonoma Regiono sinteno de la mastro al ŝi iom post iom boniĝis. Iun tagon Ĵeleako diris al ŝi: “He, Inijni, mi malbone traktis vin antaŭe, ĉu tio estis tute mia kulpo? Ne, kulpis la malnovaj reguloj kaj la sklava sistemo. Tiu sistemo tenis nian Ji-nacion posteiginta de generacio al generacio. La



Prepari Fab-kazeon (Papertranĉaĵo)

estroj vizitintaj aliajn lokojn diris, ke ankaŭ Han-nacio antaŭe havis tian sistemon, sed ĝi jam estis abolita antaŭ kelk-mil jaroj. Ankaŭ nia Ji-nacio nuligos tian sistemon. Post ĝia nuligo, vi ne plu estos mia sklavino kaj vi laboros por vi mem. Nun ni estroj pridiskutas tiun ĉi problemon.” Aŭdinte tiujn vortojn, ŝi sentis, kvazaŭ ŝi estis en sonĝo. Post-longe ŝi ankoraŭ demandis al si mem: “Ĉu tion vere diris la mastro?” Tiam, Ibiuu jam mortis antaŭ kelkaj jaroj pro malsano. Nokte sklavino nomita Ĵeleati venis paroli kun ŝi. Ŝi demandis al Ĵeleati pri tio kaj li respondis: “Tio estis dirita de la progresaj mastroj, kiuj fariĝas klarvidaj kaj saĝaj sub la gvidado de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ.” De Ĵeleati ŝi aŭdis multon pri la liberigo de la sklavoj, kion ŝi ne sciis antaŭe. Poste, Ĵeleati parolis pri la geedziĝa libero en la regiono de Han-nacio. Tiam ŝi ekhontis kaj suspektis:” En mia hejmo ne estas viro, do por kio li venis tien ĉi?...”

Ŝi amis Ĵeleati-n, ŝi amis lin el la fundo de sia koro. Sed, neniam ŝi kuraĝis pensi pri geedziĝo kun Ĵeleati, ĉar ili ja ne estis sklavoj de la sama mastro! Ĵeleati ŝin amis sed li neniam kuraĝis eniri ŝian ĉambbron. Iun matenon, Ĵeleati denove venis. Post iom da babilado, Ĵeleati ŝin demandis kun rideto: “Ĉu ni geedziĝu?”

“Mi ne kuraĝas.” ruĝiĝis ŝia vizaĝo.

“Estu kuraĝa! Ne timu! Mi. . . .”

“Ne diru! Se la mastro informiĝus, li dehakus vian kapon!”

“Mia mastro jam lasis min lerni kaj labori ekstere. . . . Vi, mi amas vin. . . .”

“Iru, iru! Se la mastro sciigos, li min batos. Mi timas.” Ŝi puŝis Ĵeleati-n ekster la pordon.

Pri tio informiĝis la mastro. Juĝiniĵ pridemandis ŝian opinion pri edziniĝo al Ĵeleati. Kompreneble ŝi jam konsentis en la koro, tamen ŝi diris: “Mi ne edziniĝos, mi restu via sklavino dum mia tuta vivo.” Juĝiniĵ ekridetis:” Ne estu stulta! Kiel bona junulo li estas! De kie vi povas elekti tian homon?” Sed ŝi ankoraŭ ne donis sian konsenton, ĉar ŝi ne sciis ĉu Juĝiniĵ tion diris sincere. Juĝiniĵ ankaŭ diris al ŝiaj gepatroj, ke ŝi tute ne kontraŭos se ili geedziĝos. Nur tiam ŝi ekkredis, ke la mastro jam ŝanĝiĝis, kaj ŝi geedziĝis kun Ĵeleati.

Kiam la demokrata reformo komenciĝis, ŝi iris la unua al la gubernia urbo por ĉeesti kunvenon. Ŝi propagandis al la sklavoj en iliaj loĝejoj, helpis la liberigitajn sklavojn aranĝi siajn proprajn hejmojn, gvidis la amason organizi agrikulturan kooperativon kaj ŝi fariĝis kapabla kaj elokventa kadro. Kiam Ĵeleati fariĝis kadro de la distrikta registaro, tiam ŝi ankaŭ estis elektita kiel vicvilaĝestro de Maŭmaŭgoŭ. “Estas ridige rememori la tagon kiam oni elektis min vicvilaĝestro! Tiam mi nur vidis amason da homoj brue aplaudantaj kaj ridantaj, kaj rigide starante kiel ligna pupo, mi demandis al mi mem, ĉu sklavino povas fariĝi vicvilaĝestro? Iu ektiris min, ĉar oni petis min fari paroladon, sed tiam mi ankoraŭ demandis, kion oni volas! Antaŭe mi tute ne atendis la hodiaŭan feliĉon eĉ en sonĝo!” ŝi diris.

La sekvintan tagon, ŝi kondukis min ĉirkaŭrigardi la pli ol 50 muojn da nove kulturita virga tero kaj la



Tapiŝteksado de Li Huanmin (Lignogravuraĵo)

nove konstruitan elementan lernejon. “Antaŭe, ĉe ni Ji-nacio preskaŭ ne ekzistis homoj kiuj povosciis legi. Ekde nun ĉiuj infanoj povos lerni en lernejo.” ŝi diris. Ni plue vizitis la riparitan akvo-muelilon kaj montvojon. Vilaĝestro Aructu diris al mi antaŭe, ke en ĉiuj tiuj konstruaĵoj. Inijni ludis modelan rolon kaj faris multajn bonajn proponojn. Tamen ŝi mem nenion diris pri tio, sed nur diris: “Vidu, la floroj de feliĉo sur la monto de Ji-nacio jam ekfloras. Ili certe florados pli kaj pli bele kaj abunde. Revenu al ni post kelkaj jaroj kaj la lokon vi ne povos rekoni.


Mi forlasis Maŭmaŭgoŭ kaj malsupreniris la montegon altan je tri mil kvarcent okdek metroj super la marnivelo. Duonvoje mi rondiris krutaĵon, kaj subite mi denove vidis Inijni. Blanka nuboj ŝvebis ĉe ŝia talio. Super ŝia kapo estis klara blua ĉielo kaj verda arbaro. Portante surdorse korbon el bambuo, ŝi jen aperis jen malaperis en la nuboj kvazaŭ feino en fabelo. Mi demandis ŝin de-malproksime kion ŝi faras. Ŝi respondis ke Aructu alportis el la gubernia urbo specimenojn de drog-herboj kaj ŝi serĉas smilakon, pastinakon kaj aliajn drog-herbojn por iniciati kromprofesion por la kamparanoj.

Trad. Chang Nai Tsun

Ni Ambaŭ Estas Lernantoj



KURANTAJ AFEROJ



140 Mil Mongoloj Eklernas Novan Skribon

Disvastigo de nova skriba formo de la mongola lingvo komenciĝis en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio ekde aŭtuno de la pasinta jaro. Nun jam pli ol 140 mil mongolaj gejunuloj, t.e. duono de la tuta lernantaro en la aŭtonoma regiono, lernas la novan skribon.

Novaj Gazetoj Aperis

En la lasta kvarono de 1957 aperis dek kelkaj novaj gazetoj. El ili plejparto estas fakaj ekz. financaj, teknikaj, kemiaj, ĝardenistaj k.t.p. Troviĝas inter ili ankaŭ gazeto dediĉita ekskluzive al minoritataj problemoj kaj gazetoj pri novaj sciencoj ekz. pri aŭtomatigo kaj oceanografio.

Laŭdinastia Historio de Ĉinio Reeldoniĝos

24 *Historioj Laŭdinastiaj de Ĉinio* estas nepre necesa materialo por studi ĉinan historion. Zhung-hua Librejo jam decidis ĝin reeldoni. La libro traktas la ĉinan historion de antikveco ĝis la fino de Ming-dinastio (1644 p.K.). La tuta verko dividiĝas en 80 volumoj. Antaŭ junio de 1958 ĝi jam estos aĉetebla en la librejoj

EN la aŭtuno de 1953, iu malnova kamarado, kiu iam laboris kun mi, skribis al mi, ke mi helpu iun lernanton en la lernado de matematiko. Tio, kion mi lernis antaŭ pli ol dek jaroj, estis jam plejparte forgesita, kaj krome tiam mi instruis historion, kio havas nenian rilaton kun matematiko, do kiel mi povus helpi alian en ĝia lernado? Tial mi rifuzis la peton kun ekskuzo. Sed la malnova kamarado estis tre persistema, li reskribis al mi argumentante, ke por mezlerneja instruisto estas neeble ne povi kompetente instrui ĝeneralan matematikon, kaj nepre deziris, ke mi gvidu la lernanton. Li diris krome, ke li baldaŭ veturos al la Nordokcidento por partopreni konstruan laboron, do mi jam ne respondu al li. Kune kun la letero li sendis al mi ekzercojn de la lernanto, ekzercojn de ebena geometrio kaj elementa algebro. La afero, se ĝi jam disvolviĝis ĝis tiu stato ŝajnis al mi jam ne ŝangebla. Ĉar tiam mi ankaŭ iom zorgis pri administrado, kaj estis iom okupata, tial mi petis helpon de sinjoro Ŭang, kiu instruis geometrion. Se ekzercoj aŭ demandoj alsendiĝis, mi ilin transdonis al li, kaj poste mi enkovertigis la ekzercojn korektitajn de sinjoro Ŭang, kaj ilin resendis. Unufoje en ĉiu semajno, kaj ĉiufoje tute same. La kovertoj kun adreso kaj surgluita poŝtmarko estis pretigitaj de la lernanto mem. Estis ne malfacile tiel helpi la lernadon, tial mi volonte daŭrigis tiun laboron.

En la komenco, la lernanto skribis al mi mallongan leteron nur por min danki pro la helpo; li diris nenion alian. Kaj poste, dum tre longa tempo li nenian leteron skribis al mi, kaj tiel forpasis la tuta semestro.

En la sekvinta printempo, sinjoro Ŭang havis pli da instruaj taskoj, kaj ne povis trovi libertempon por min helpi. Kontrolinte la lernadon mi trovis, ke la lernoprogramo baldaŭ estos finita, kaj estis ne dece forlasi la lernanton senhelpa duonvoje; sekve mi devis mem preni sur min tiun taskon. Eble pro tio, ke mi devis maldormi ĝis profunda nokto unu fojon ĉiusemajne por tiu lernanto (tre multaj estis liaj ekzercaĵoj, preskaŭ 20-30 problemoj ĉiufoje; ankaŭ liaj demandoj estis tre strangaj, ke oni kelkfoje devis iom cerbumadi por ilin bone respondi), mi komencis atenti pri tiu lernanto. Tamen malgraŭ tio mi ankoraŭ ne multon sciis pri li. Li nomiĝis Ĝang Ŝjaŭ-ping, licea gradigito en 1952, kaj li ne sukcesis trapasi la enirajn ekzamenojn por supera liceo kaj mezgradaj teknikaj lernejoj. Pri alio mi ne bone informiĝis, kaj verdire, me ne havis la intereson informiĝi pli multe.

Kiam komenciĝis la printempaj ferioj, la lernprogrameroj de Ĝang Ŝjaŭ-ping finiĝis. Mi elsendis la lastajn ekzercojn kaj mian unuan leteron al li, kaj pensis kun certeco: jen estas la fino de nia instrua interrilato. Sed kiu atendis, ke semajnon poste, Ĝang Ŝjaŭ-ping skribis al mi denove. Li diris, ke li lernos de mi solidan geometrion kaj altan algebron. Vortoj ne multaj, sed tre sinceraj, kaj ankaŭ tre decidemaj. Estante antaŭulo kaj instruisto, kiu povus rifuzi la entuziasman peton de junulo!

Studoj pri Kresko de Loĝantaro

Lasttempe pluraj sociologoj dediĉas sian forton en la studo pri kreskado de loĝantaro en Ĉinio. Plejparto el ili opinias, ke la nuna kreskado de loĝantaro estas fenomeno ĉe la komenco de socialisma konstruado, ĉar dank' al tio la proporcio de malsano kaj morto rapide malgrandiĝas, sed kiam la malgrandiĝo atingos la naturan limon, ĝi malrapidiĝos. Ankaŭ la naskiĝa procento ne plu altiĝos, kiam la vivnivelo de la popolo plialtiĝos. Ili neis la aserton, ke en Ĉinio estiĝas problemo de superfluo de loĝantaro.

Kvankam la iam lernitaj lecionoj estis plejparte forgesitaj, tamen ili ja estis lernitaj; do, same kiel antaŭe ekzercoj kaj demandoj alsendiĝis, kaj post korekto aŭ respondo resendiĝis. Same eĉ sen unu aldona vorto. Kelkfoje, frapate de lia mirinda komprena kapablo kaj diligenteco, mi ekdeziris ion skribi al li sed pro okupateco mi devis rezigni ankaŭ tion.

En la jaro 1955, la lecionoj de Ĝang Ŝjaŭ-ping finiĝis, kaj krome mi jam transposteniĝis; sed ne multajn tagojn poste, min atingis lia letero. Ĉi-foje li skribis tre multe. Li diris interalie:

“En iu Sovetia novelo, oni diris: ‘Nia patrio estas vastega nedroniga lago’. La spertoj bone konvinkis min, ke ankaŭ nia patrio estas ĝuste tia. Oni diras, ke nedronigaj lagoj efektive troviĝas en la mondo, kaj pro tio ke la akvo de tiuj lagoj estas salosaturita, oni ne povas subakviĝi en ili.

“Antaŭ tri jaroj, mi malesperiĝis pro la malsukceso eniri superan liceon; mi pensis, ke mia estonto estos senespera, kaj mi malsupreniĝos. Sed fakte okazis al mi tute alie: dank' al via instruado mi jam finstudis la kursojn de supera liceo, kaj spertis tute malsaman vivon ol en lernejo. Mi ŝatas ĉitian vivon kaj ankaŭ eksciis kiel vivi.

“Vi estas salero solvita en la lago. Kaj miloj kaj dekmiloj da tiaj saleroj faras nian patrion nedroniga lago.”

Kiel li vivas, nun ni lasu, sed lia peto elmetita ĉe la fino de la letero, ke mi lin instruu pri analitika geometrio kaj kalkuluso, estis tre cerborompa por mi. Unue, mi estis lernonta la rusan lingvon; due, tiuj du studobjektojn eĉ mi mem ne bone sciis, do kiel instrui al aliaj? Mi pripensis 4-5 tagojn, kaj longe interkonsiliĝis kun 3-4 kamaradoj, kiuj poste promesis min helpi, kaj fine mi spiteme akceptis lian peton. Mi diris al mi mem kun maldolĉa rido: Nu, mi ludu vole- nevole la rolon de salero!

Kaj lerni la rusan lingvon mi jam de- longe deziris, sed mi hezitadis, kaj ne kuraĝis komenci. En nia lernejo situanta en la kamparo ne troviĝis radiaparato, kaj ĉar la lernantoj en nia lernejo ankoraŭ lernis la anglan lingvon, tial ne troviĝis en ĝi ruslingva instruisto; kaj neniu kolego povis min helpi en la lernado de la rusa lingvo. Eble pro tio, ke la rezonado de Ĝang Ŝjaŭ-ping pri “salero” kuraĝigis min, en marto de la pasinta jaro, subite ekfulmis al mi nova ideo, kaj mi skribis leteron al la ruslingva fakultato de iu universitato por peti ilian konsilon al mia memlernado. Tion mi faris nur por trovi hazardan favoron de la sorto, kaj se mi ne ricevus respondon, mi do lasus la aferon. Tamen neatendite respondo baldaŭ venis, kaj sur 5-6 paĝoj svarme skribiĝis klarigoj pri uzebila lernolibro, lern-metodo, kion fari unue kaj kion due, kaj post ellerno de tiu libro legi kiajn gazetojn ktp. Kaj la Sekvintan tagon ili alsendis al mi siajn lecionojn pri prononcado.



Post Lernohoro

de Pan Ho

KURANTAJ AFEROJ

Granda Ponto sur Jangze-rivero Finkonstruita

La plej granda duferdeka ponto en Ĉinio sur Jangze-rivero ĉe Uhan estas finkonstruita. Ĝi longas je 1,700 m. kaj larĝas je 23 m. Sur la supra ferdeko estas vojo por aŭtoj kaj piedirantoj kaj malsupre duobla fervojo por vagonaroj kurantaj ambaŭdirekten. La tuta konstruado de tiu giganta konstruaĵo sur tiom profunda rivero daŭris nur du jarojn (de sept. 1955 ĝis sept. 1957). Tiu ĉi ponto kune kun du antaŭnelonge konstruitaj fervojaj kaj aŭtovoja pontoj sur Han-rivero ne nur interligis la urbojn Hankoŭ, Uĉang kaj Hanjang en veran urbotrion, sed ankaŭ unuigis la fervojojn de Kantono ĝis Uĉang kaj de Hankoŭ ĝis Pekino. De nun tiuj du fervojoj kune nomiĝos Pekin-Kantona Fervojo, kaj la vagonaroj povas rekte trakuri la tutan linion de pli ol 2,300 km, kaj ne necesas transportado per specialaj pramoj. Krom tio, ĝi povas interligi, per branĉoj de tiuj du fervojoj, la ceterajn lokojn en Guangsi-, Ĝiangsi- kaj Ĉekiang-provincoj, kaj iom poste la provincojn Seĉuan, Guejĝoŭ kaj Fuĝian.

(Foto de Li Ĝi-lu)



Sed la prononcado ja estas tre malfacila, multaj vortoj diferenciĝas unu de la alia nur je malsameco de la akcentaj lokoj; se oni ne povas ilin prononci korekte, do oni ne povas ilin memori bone. Kelkfoje mi interrompis kaj rekomencis la lernadon, kaj nur tiamaniere persistis ĝis la someraj ferioj kaj apenaŭ ellernis la unuan volumon.

Dum la someraj ferioj de la pasinta jaro, mi iris al Ningpo pro laboro. Antaŭ la reveno mi vizitis Ŝinhŭa-librejon por aĉeti la duan volumon de la ruslingva lernolibro por daŭrigi la lernadon. Ĉe la bretoj de fremdlingvaj libroj, mi vidis ĉirkaŭ-dudek-jaran knabinon, mallaŭte legantan ruslingvan libron. Mi pensis, jen estas tre bona ŝanco por peti helpon; tamen mi ne kuraĝis aŭdigi mian peton timante interrompi ŝian legadon. Eble ŝi jam rimarkis min, jen ŝi levis sian kapon kaj diris:

“Ĉu vi volas ĝin legi? Tre interesa ĝi estas!”

“Ne,” mi respondis kun hontema rideto, “mi ĵus komencis lerni la rusan lingvon.”

“Ĉu glate iras via lernado?”

“Malfacile, en prononcado.”

“Ankaŭ mi ne povas bone elparoli.” Ŝi ekprenis ruslingvan lernolibron de librobreto, foliumis kelkajn foliojn kaj montrante ne facile elparoleblajn vortojn diris: “Ĉu ĉi tiuj? Aŭdu, ĉu mi ĝuste elparolas.”

Ni do nin apogis al breto, ŝi laŭtleĝis kaj mi ŝin imitis. Ŝi atente korektis por mi la misprononcojn. Forgesinte, ke mi estas jam tridek kvin-ses-jara, kaj sentante kvazaŭ revenus mia infanaĝo kaj nun mi starus antaŭ instruistino, mi legadis kun iom da timo kaj ĝojo.

Bedaŭrinde, tiam iu kolego ekvokis min por interparoli kun mi pri reveturo al la lernejo, kaj mi devis formeti la libron kaj forlasi la breton. Sed kiam mi min returnis, la knabino jam malaperis.

Mi vere ĉagreniĝis, ĉar mi perdis mian instruanton. Mi pentis ankaŭ pro mia neglekto: por ne diri la adreson, eĉ ŝian nomon mi ne pridemandis. Mi nur malklare memoris, ke ŝi estas malalta, en blua kampara bluzo, kun nudaj piedoj en tolaj ŝuoj. Sed du aferoj tre profunde impresis min: ŝia mano, per kiu ŝi montris al mi la elparolendajn vortojn, estis kruda, preskaŭ kaloplana; kaj krome ŝi estis tre entuziasma en lernigado.

Reveninte al la lernejo, mi ofte ekmemoris tiun malaltkreskan knabinon. Kio ŝi estas? Ĉu kamparanino? Ŝi ne aspektis tia. Ĉu instruistino? Se jes, ŝi ne havus tian kaloplanan manon. Kaj laboristino eble ne tiel sin vestus. Mi multe bedaŭris, ke eĉ ŝiajn nomon kaj adreson mi ne pridemandis.

* * *

Antaŭ kelka tempo, mi informiĝis, ke iu kamparano en Ŝenŝan-vilaĝo posedas ne malmultajn gazetojn subtere eldonitajn de la Kompartio antaŭ la liberigo, kelkajn el kiuj eĉ eldonitajn antaŭ la Kontraŭjapana Milito. Ĉar mi estis instruisto de historio, certe mi tre deziris vidi la valorajn materialojn. Ŝenŝan troviĝas ĉe la maro, nur tri-dek liojn* for de nia lernejo, ke oni povas iri kaj reiri en unu tago. Kaj lastan dimanĉon mi ĝin vizitis.

Nur kiam mi jam estis tre proksima al Ŝenŝan, mi subite ekmemoris, ke ankaŭ Ĝang Ŝjaŭ-ping loĝas tie; mi tre volis viziti tiun ĉi “lernanton” mian, sed ne povis tuj memori lian adreson. Atinginte Ŝenŝan-on, neatendite, mi facile informiĝis pri lia loĝejo, ĉar Ĝang Ŝjaŭ-ping estis eĉ malgranda specialisto en grundo-plibonigo, kaj ĉiuj survojoj irantoj sciis lian nomon. Oni diris, ke sub lia gvido oni akiris pli ol ducent

* 1 lio = ½ kilometro

muojn** da apudmara tero per digokonstruado, kaj dank' al lia cerbumado, la okdek muoj da sala rizkampo jam fariĝis nesala.

La hejmo de Ĝang Ŝjaŭ-ping troviĝis ĉe la norda vilaĝino en duĉambra kabano. Kiam mi eniris lian domon, nur lia patrino estis hejme. Ŝi petis min sidiĝi kaj sendis knabon por Ĝang Ŝjaŭ-ping. La loko, kie mi sidis, ŝajnis al mi la loko kie Ŝjaŭ-ping kutime lernadis. Sur malnova kvadrata tablo sterniĝis ne malmulte da libroj, kaj meze de ĝi kuŝis malfermita dikega libro pri agroteologio. Ĝia enhavo estis tute fremda por mi, kaj tre okul-

frapaj estis la ruĝkrajone substrekitaj ekvacioj diferencialaj. Nur tiam mi ekkomprenis, ke estas por solvi problemojn en agroteologio ke Ĝang Ŝjaŭ-ping lernadis matematikon.

Subite enkuris knabino kiel vento, kaj forte ekpemis mian manon dirante:

“Ha vi venis, sinjoro instruisto!”

Atente taksante oni povis diri, ke tiu ĉi knabino estas jam ĉirkaŭ dudek-jara, kvankam iom malaltkreska ŝi estis. Ŝiaj vangoj estis malgrasaj, kaj iom palaj; ŝiaj okuloj, tre grandaj kaj sincere rigardantaj. Mi ne klare memoris, kie mi ŝin instruis, tamen ŝajnis al mi, ke mi ie ŝin vidis. Ŝi jam rimarkis mian heziton kaj diris ridetante:


“Mi ja estas via lernanto Ĝang Ŝjaŭ-ping. Ŝajne ni jam ie intervidis unu la alian.”

Ĉu tiu ĉi malalta knabino estas Ĝang Ŝjaŭ-ping? Kaj ĉu tiu ĉi mano premanta la mian, ĉu ĝi vere estas la kruda mano kaloplana kiu montradis al mi la vortojn en la ruslingva lernolibro en la librejo? En mia memoro kvazaŭ ekfulmis, kaj ĉio klariĝis por mi. Ekmemorante mian nevolontecon en helpado al la lernado de Ĝang Ŝjaŭ-ping, mi eksentis veran honton. Varmo trakuris mian koron, kaj forte premante ŝian manon mi diris:

“Ne! Mi estas via lernanto.”

Esperantigis Li Shi-gyn

**I muo = 6.667 aroj.



La supra ferdeko de la Jangze-rivera Pontego

Foto de Li Ĝi-lu

KURANTAJ AFEROJ



Nomada Popolo Ekloĝiĝas

En la nordorienta parto de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio troviĝas malgranda nacio Ngolunĉun, kiu vivis ĝis antaŭ nelonge kiel nomada popolo. Ekde 1954 helpate de la ŝtato 47 familioj ekenloĝiĝis en fiksitajn loĝejojn. Ĉi-jare la ŝtato denove konstruis por ili novajn loĝejojn. Tial krom 22 familioj, kiuj nomadas en iom pli foraj lokoj, ĉiuj familioj de la malgranda nacio ricevis fiksitan loĝejon, kaj ili povas entrepreni krom ĉasado ankaŭ agrikulturon.

Nova Riĉa Mino de Marmoro Trovita

Marmoro en Ĉinio estas nomata Dali-ŝtono, ĉar antaŭe ĝi troviĝis sole en Dali-gubernio en Junnan-provinco. Lertaj ŝtonhakistoj ofte ĝin poluris ĝis sur ĝia supraĵo aperis belaj naturaj desegnaĵoj kiel pentritaj. Oni tre ĝin valorigas. Lastatempe oni trovis, ke tiu ĉi valora ŝtono ekzistas en granda kvanto ankaŭ en Tajbaj-monto en Ŝaansi-provinco, kaj la kvalito egalas al tiu de Dali-ŝtono.

TUJ APEROS LERTA VIRINETO

Bela popolarakonto en 46 bildoj kun lakona Esperanta teksto.

Aĉetebla ĉe Ĉina Esp-Ligo kaj la perantoj de nia gazeto.

Formato: 18 × 13 cm.

Kosto: 2 resp. kup.

Via ...

Via korp' gracia
estas poplo bela;
kaj l' buŝeto via —
vinber-suk' miela.

Viaj dentoj blankaj
estas perloj konkaj;
via buŝo dolĉa —
ja por ĉiuj sorĉa.

Viaj nigraj brovoj —
kvazaŭ diroj juĝaj;
viaj okul-movoj
estas anim-suĉaj.

Brusto Via — Kuracilo Mia

La flamo de via amo
brulvundis mian koron!
Demandis mi doktoron,
li diris: brusto via — kuracilo mia.

Saluton al la Amantino


Ĉiele fluganta
soleca hirund',
al la amatin' pripensanta min
transdonu saluton el mia korfund'.

Vi nuboj en supra spac'
salutu l' amatinon por mi.
Se ŝi vin demandas pri mi,
vi diru: mi vivas en pac'.

Korvaroj en la firmament'
salutu al mia amatin'.
Se miaj okuloj nun estus sen plend',
ja mia anim' sopiradas plu ŝin.

Trad. Laŭlum

Ujguro — ĉina minoritato.



KURANTAJ AFEROJ

Pli ol 200 Famaj Klasikaj Verkoj Eldoniĝos

La Popola Literatura Eldonejo decidis reeldoni pli ol 200 famajn klasikajn literaturajn verkojn en la lasta duono de 1957. Inter ili troviĝas la plej ŝatataj sed malfacile akireblaj verkoj "Ĉe la Akvorando" (Ĉe la Bordo de Liangŝan-lago), "Rakonto de la Tri Regnoj", "300 Poemoj de Tang-dinastio", kaj la verkaroj de nuntempaj eminentaj verkistoj Maŭ Dun, Bakin, Laŭ Ŝe, Caŭ Ju kaj aliaj. Ankaŭ tradukaĵoj de verkoj de Puŝkin, Gogol, Balzac kaj Henry Fielding k.a. viciĝas en la eldona listo.

La Unuaj Modernaj Tibetaj Instruistoj

El porinstruista klaso de Lhasa Mezlernejo lastatempe edukiĝis la unuaj modernaj Tibetaj instruistoj. Tiu ĉi klaso komenciĝis en pasintjara somero kaj la kursanoj jam ellernis fundamentajn lecionojn pri la gramatiko de la Tibeta lingvo, naturaj sciencoj, kaj pedagogio. Ili tuj iros instrui en elementaj lernejoj de vilaĝoj kaj paŝtaj regionoj.

Popolliteraturaj Verkoj de Ĉinaj Minoritatoj Estas Studataj

En Junnan-provinco pli kaj pli da literaturistoj sin dediĉas al studado de minoritataj popolliteraturaĵoj. Nun en la tuta provinco jam pli ol 150 personoj el la nacioj Han, Taj, Baj, Naŝi partoprenas tiun ĉi laboron. Multe da nove trovitaj verkoj publikiĝis sur diversaj ĵurnaloj kaj gazetoj, kaj fondiĝis ankaŭ organizoj kelkloke por tia studo.

22,000,000 Analfabetoj Akiris Legpovon

Laŭ statistiko en la pasintaj ok jaroj 22,000,000 analfabetoj ricevis edukadon kaj fariĝis legpovaj. El ili 1,600,000 personoj atingis la nivelon de diplomito de elementa lernejo aŭ mezgrada lernejo.

Filmoj de Aziaj Landoj

En lasta aŭtuno okazis sinsekve en dek ĉinaj grandaj urboj "Semajno de Aziaj Filmoj". Prezentigis en la semajno 16 filmoj el 14 Aziaj landoj: Birmo, Cejlono, Hindio, Indonezio, Japanio, Koreio Libano, Mongolio, Pakistano, Singaporo, Tajlando, Vietnamo kaj Ĉinio. Estis la unua fojo, ke filmoj el Birmo, Pakistano, Cejlono, Tajlando, Indonezio kaj Libano prezentigis en Ĉinio. Tio instigis grandan intereson de la publiko en Ĉinio.



Bonvole juĝu Via Guberniestra Moŝto!



DIKVENTRULO Ĝang estis bienulo en la Grana Ĝang-vilaĝo. Li ofte tenis sin fiera kaj kolerema al la malriĉuloj, sed ekvidante aŭtoritatulojn li tuj fariĝis riverencema, diskreta, flatema kaj cedema.

Unu tagon, la guberniestro veturis preter la vilaĝo. Dikventrulo Ĝang pensis, jen estas bona ŝanco por flat-akiri favoron. Li do invitis la guberniestron al sia hejmo por lin regali per bonveniga festeno.

Altabliĝante por ekmanĝi, la guberniestro demandis: "Kio estas via familia nomo?"

Rimarkinte, ke prezentiĝas ŝanco por flati, la dikventrulo tuj salte stariĝis de sia seĝo kaj riverencante respondis: "Bonvole juĝu, via guberniestra moŝto!"

Aŭdinte la respondon la guberniestro tre miris, li enmetis viandpecojn en la buŝon kaj saliverojn disŝprucante diris: "Aj, kia diro! Mi ne konis vin antaŭe, kiel do mi povus scii vian familian nomon? Kiel mi povas scii ĉu via familinomo estas Ĝang aŭ Ŝang?"

La dikventrulo tuj denove riverencis kaj diris: "Dieca juĝo! Mia familinomo ja estas kaj Ĝang kaj Ŝang. Ĉar antaŭe mia familinomo estis Ŝang, sed post la morto de mia patro, la patrino reedziniĝis al sinjoro Ĝang, mi do alvenis kun ŝi al la familio Ĝang, tial mi havas du familinomojn."

Iom poste la guberniestro denove demandis al la dikventrulo: "Kiun aĝon vi havas?"

La dikventrulo iom antaŭen ŝovis la seĝon kaj denove riverencante respondis: "Bonvole juĝu, via guberniestra moŝto!"

La guberniestro ekstultiĝis kaj diris: "Kiel juĝi! Kiel oni povus juĝi pri la aĝo? Ĉu mi povus diri, ke vi estas tridekjara? ĉu mi povus diri, ke vi estas kvardekjara?"

Apenaŭ la guberniestro finis sian parolon, la dikventrulo jam senĉese laŭdis: "Eja! Vere prudenta juĝisto estas via guberniestra moŝto, vi ĉion komprenas tiel klare, vi eĉ scias, ke mi estas kaj tridekjara kaj kvardekjara. Mi konfesu, efektive mi estas jam kvardekjara. Sed malfeliĉe mia edzino mortis antaŭ du monatoj, mi petis svatistinon svati por mi alian virinon, kaj por ke mia aĝo ne malplaĉu al la svatatino, mi do malaltigis ĝin je dek jaroj kaj diris al la svatistino, ke mi estas nur tridekjara; kaj tial mi havas du aĝojn."

Aŭdinte la respondon, la guberniestro ridegis kaj post momento demandis ankoraŭfoje: "Do, kiu estas via naskiĝdato?"

Kiel antaŭe la dikventrulo riverencante respondis: "Bonvole juĝu, via guberniestra moŝto."

La guberniestro iom malpacientiĝis kaj diris: "Kia diro! Mia babilajo pri viaj familinomo kaj aĝo nur hazarde pravis, sed mi ja ne estas via patro, do kiel mi povus scii vian naskiĝdaton? Ĉu mi povas diri, ke vi naskiĝis je la tago unua? Ĉu mi povas diri, ke vi naskiĝis je la trideka? Ĉu mi povas diri, ke vi naskiĝis je la horo unua? Ĉu mi povas diri, ke vi naskiĝis je la horo dudekkvara?"

Tuj post la parolo de la guberniestro, la dikventrulo rapide sin faligis surteren, kaj surgenue riverencis laŭdante: "Penson klaran kiel akvo kaj vidon klaran kiel spegulo ja havas via guberniestra moŝto! Mi diru la veron: Mia patrino min akuŝis tre malfacile: je la horo unua de la trideka tago mia kapo jam estis elpuŝita, sed la korpo neniel povis eliĝi, kaj nur je la dudekkvara de la unua tago de la sekvinta monato la korpo fine tute elpuŝiĝis. Tial mi ja naskiĝis en du datoj kaj je du diferencaj horoj. La diro de via guberniestra moŝto estas tute prava, ĉion vi scias kiel mia propra patro. Via moŝto certe meritas la titolon Patro Guberniestro! Hehehe!"

La guberniestro jam estis dolĉe kontenta pro la bongustaj manĝaĵoj, kaj kompreneble des pli ĝojiĝis pro la flatemaj vortoj de la dikventrulo dum la festeno. Sed de tiam, en la vilaĝo ĉiuj rigardis la dikventrulon Ĝang kiel veran senhontulon.

Esperantigis Zekun

Ĉina filatelisto deziras interŝanĝe ricevi Sovetiajn poŝtmarkojn, uzitajn aŭ freŝajn, prefere en kompletoj. Bonvolu afranki filatele k per kompletoj da p.m. Adreso: Ĉinio, Pekino, P. O. Kesto 77, pere de Ĉina Esperanto-Ligo, K-do K. Ĝ. Ĉin.

TRI ĈINAJ ANTIKVAJ FABLOJ

Mislernado

Ĉar Ŝiŝe, la fama belulino, suferis de pirozo, ŝi ofte kuntiris la brovojn antaŭ siaj najbaroj.

Malbelulino en la sama vilaĝo, kiu tion rimarkis kaj trovis tion tre ĉarma, ankaŭ metis siajn manojn sur la bruston kaj kuntiris la brovojn antaŭ ĉiu renkontato. Ŝin ekvidante, la riĉaj riglis siajn pordojn kaj ne volis eliri; kaj la malriĉaj, ĉiuj forkuris de ŝi kun siaj edzinoj kaj infanoj.

Kompatindulino! Ŝi povis admiri la brovkuntiron de Ŝiŝe, sed ne sciis kial tio estas bela.

—El “Ĝŭangze”*



Ŝteli Sonorilegon kun Ŝtopitaj Oreloj

Post la disfalo de la domo de Fan, iu prenis por si bronзан sonorilegon. Ĝi estis tro granda por forporti sur lia dorso, kaj kiam li klopodis ĝin disrompi per martelo, ĝi tiel tintegis, ke li ektimis, ke aliaj tion aŭdos kaj forprenos de li la sonorilegon. Tial li rapide ŝtopis siajn orelojn.

Estis pravigeble maltrankviliĝi pro la bruo, sed estis stulte ŝtopi siajn orelojn.

—El “Paroloj de Lju Bu-ŭej”**

La Strigo Transloĝiĝas

La strigo renkontis la turton.

“Kien vi iras?” demandis la turto.

“Mi transloĝiĝas orienten,” diris la strigo.

“Kial do?” demandis la turto.

“Ĉiuj ĉi-tie malŝatas mian ululon,” respondis la strigo, “tial mi volas transloĝiĝi orienten.”

“Se vi povus ŝanĝi vian voĉon,” diris la turto, “do tio helpus. Tamen se vi ne povas, eĉ se vi transloĝiĝos orienten, la tieaj loĝantoj vin malŝatos tute same.”

—El “Ĝardeno de Anekdotoj”***

Elĉinigis H. M.

* La instruoj de Ĝŭangze (Ĝŭang Ĝoŭ), kiu vivis en la tria aŭ kvara jarcento a.K. Parto de la libro, oni opinias, estas verko de pli malfruaj verkistoj.

** Libro atribuita al Lju Bu-ŭej (?-235 a.K.) plejparte estis verkita de liaj protektatoj.

***Verko de Liu Ŝjang (78-8 a.K.)



La Krokodilo de Sipsŭanbanna

MULTE da jaroj antaŭe vivis juna princino nomita Nanŭenka. Iunokte, ventego furioza blovestingis la kandelojn en la palaco, kaj fulmotondroj forte skuis la teron, ĉiuj palacaj servistinoj sin kaŝis post ŝirmkurtenojn pro timo. Vekite el sia sonĝo, kaj trovinte nenium el la servistinoj, la juna Nanŭenka ekploris pro timo. Ŝi ploradis naŭdek naŭ tagojn, kaj pro tio pluvegis naŭdek naŭ tagojn en la mondo.

Tiam venis junulino, kiu surgenuiĝis kun klinita kapo sub la trono de la reĝo kaj diris mallaŭte:

“Ho, Reĝo! Mi havas rimedon por ĝojigi la reĝidionon.”

Kaj la reĝo kondukis ŝin al la princino.

Ŝi kantis multe da kantoj al la juna Nanŭenka. Sed post kiam ŝia gorĝo jam raŭkiĝis pro kantado, Nanŭenka ankoraŭ ne ĉesis ploradi.

Tiam la junulino prenis kukumon el fruktoplado por kvietigi sian soifon. Kiam ŝia mano ekprenis la kukumon, Nanŭenka subite ĉesis plori. Kun granda ĝojo la junulino faris por la kukumo voston el lentguŝo kaj kvar piedojn el sojfabguŝoj. Tion farinte, ŝi metis ĝin al la buŝo de Nanŭenka por ke ŝi ĝin kisu. Ĝuste tiam la lasta larmero de Nanŭenka falis sur ĝin, kaj ĝi tuj ekmoviĝis kaj viviĝis. Pro tio Nanŭenka ekridegis. De tiam, Nanŭenka ĝin portadis en siaj brakoj, ĝin nomis “Daĉjue”, ridis kaj ludis. Tamen, nelonge poste, sinapogante sur la potenco de la juna princino, ĝi komencis vund-mordi servistinojn per sia buŝego.

Iutage, kiam Nanŭenka dormis, la servistinoj kunnajlis ĝian buŝon per multaj najloj kaj ĵetis tiun abomenindan monstron en Lancang-riveron. . . .

Jen estas popola rakonto de la Taj-nacio en Sipsŭanbanna pri krokodilo. Jes, la krokodilo en Lancang-rivero tre similas la malglatan kukumon, kaj krome ĝia pintaj segildentformaj dentoj ankaŭ tre similas la lignajn najlojn kutime uzatajn de la Taj-nacianoj.

Krokodilo nomiĝas “Daĉjue” en la lingvo de Taj-nacio. Tutjare, krom en novembro, decembro, januaro kaj februaro, kiam la krokodiloj ĝuas vintro-dormon, ili vagadas senbride en la malprofundejoj

de Lancang-rivero precipe dum la varmega somero. Kvankam tiuj bestaĉoj longas nur sep aŭ ok futojn, tamen ĝi ofte formanĝas porkon 25-30-kilograman kaj ŝafaron. Kaj ankaŭ homoj, kiuj sin banas en la rivero, estas atakataj de tiuj bestaĉoj.

Rampinte en malprofundejon, la krokodilo ne plu estas tiel vigla kaj facilmova kun elmontrataj dentoj svingiĝantaj ungoj kiel en profunda akvo, ĝi fariĝas malvigla kaj stulta, precipe post kiam ĝi englutis porkon aŭ ŝafon, kaj tiam ĝi dormadas ofte 3-4 tagojn kun la korpo enmergata en akvo kaj la kapo etendita sur la bordon ĝuante sunumon. Tial la tie loĝantaj Han-nacianoj ĝin nomas “drako maldiligenta”, kaj Taj-nacianoj ĉiam ĉasas ĝin laŭ ĝiaj piedsignoj. En Junĝinghung, la ĉefurbo de la Aŭtonoma Distrikto de Taj-nacio en Sipsŭanbanna, oni ofte aĉetas viandon de krokodilo por manĝi. Oni diras, ke la viando de krokodilo estas bongusta kaj delikata.

La krokodiloj en Sipsŭanbanna ĝenerale estas sep aŭ ok futojn longaj, kaj la plej dikaj estas dikaj kiel bareleto. Ĝia plata kaj longa buŝego kaj ĝia korpo plene kirasita kiel antikva urbo-pordego kun densaj najlegoj estas plej okulfrapaj. Ambaŭ flanke de ĝia frunto elstaras la okuloj grandaj kiel kokovo. Ĝiaj kvar mallertaj mallongaj piedoj havantaj po kvin malakrajn ungojn tre similas al tiuj de testudo. Ĝia korpo post la malantaŭaj piedoj pli kaj pli platiĝas en glavo-similan voston, per kiu ĝi sin turnas kaj remkuras en la akvo.

Kvankam la krokodilo en Sipsŭanbanna ne estas tiel granda kiel la “golf-krokodilo” en la Suda Maro, tamen ĝi estas 3-4-oble pli granda ol la “Jangze-krokodilo”. Alia karakterizaĵo de la krokodilo Sipsŭanbanna estas, ke ĝi havas pli longajn makzelojn, kiuj ordinare longas je unu futo, se ĝia korpo estas sep futojn longa. Tia krokodilo estas malofte videbla en aliaj regionoj de nia lando, kaj ankaŭ en Sipsŭanbanna ĝi ne troviĝas en vasta regiono. Ĉar ĝi havas longajn makzelojn kaj ĝia naskiĝa loko proksimas al Hindujo kaj Birmo, verŝajne ĝi estas parenca al la “longmakzela krokodilo” de Hindujo.

Laŭ la Taj-nacianoj “Daĉjue” vivas 3-4-oble pli longe ol elefanto, kaj tiuj kiuj manĝis ĝian viandon povas ĝui longan vivon.




Hajnan-insulo—Bela

kaj Riĉa Insulo de Ĉinio

HAJKOŬ, la urbo kie situas la Administra Oficejo de Hajnan, estas ankaŭ la bazloko por ekspluatado de Hajnan-insulo. Ĉi tie mi renkontis multe da specialistoj kaj sciencistoj, kiuj alvenis el ĉiuj partoj de la lando, por “plene ekspluati ĉi tiun trezor-insulon” kiel ili esprimis. La esplorado de la tuta insulo jam plenumiĝis, baldaŭ pretiĝos plano por plena ekspluatado de la insulo.

Hajnan-insulo estas la dua granda insulo de Ĉinio (la unua estas Tajĵan), kun areo de pli ol 33,000 kvadrataj kilometroj kaj kun loĝantaro de pli ol 2,700,000. Sur la insulo estas plantitaj multe da altvaloraj tropikaj kreskaĵoj ekz. kaŭĉukarbo, kokosarbo, rapir-kanabo, sukerkano, pipro, kafo, ananaso, kinkono ktp, entute kelkdek specoj da altvaloraj kreskaĵoj. Rizo povas esti kreskigita dum la kvar sezonoj. Ĉiujare oni trifoje rikoltas pataton, maizon, gaŭljangon (*andropogon sorghum*) kaj fabon.

Sur la Kvinvingra Monto meze de la insulo troviĝas primitivaj arbaroj, tra kiuj la sunlumo ne povas penetri. En la ventro de la montaro oni jam trovis oron, volframon, feron, glimon kaj kristalon.



Sur la Sudmara Bordo Lignogravuraĵo de A Taŭ

En la maro ĉirkaŭ la insulo sin trovas neelĉerpeblaj marproduktaĵoj.

Iun belan matenon de plumecaj nubetoj kaj karesa zefiro, mi komencis mian vojaĝon tra la insulo. Je mia ekiro el la urbo Hajkoŭ, iu sciencisto diris al mi: “Kamarado pekinano, bone pririgardu! Al homo, kiu ne faris viziton al Hajnan-insulo, estas malfacile imagi kiel bela ĝi estas; des pli malfacile imagi kiel riĉa ĝi estas.”

Nia aŭtomobilo fluge kuradas sur la glata ŝoseo. Ambaŭflanke viciĝas gigantaj kokosarboj kiel miloj da belaj sunombreloj; la folioj de la palmoj estas densdensaj. Ili ŝajnas esti aroj da rondaj verdaj ventumiloj. En la longa galerio ombrita de la arboj dise kreskas diversaj nekonataj sovaĝaj floroj. Verdaj rizkampoj ondadas sub venteto. En ananasejoj brilas oraj grandaj fruktoj.

Transirinte Tunchang-gubernion ni eniris la regionon de densdensa arbaro, tra kiu nia aŭtomobilo traboras. Ju pli antaŭen kuras la aŭtomobilo, des pli densa fariĝas la arbaro kaj des pli dikaj kaj altaj estas la arbotrunkoj. Iu kunveturanto, kiu estas Hajnan-insulano, montris multe da maloftaj arboj al mi. La ligno de ĉi tiuj arboj estas malmola, nek akvon nek insekton ĝi timas, kaj ĝi estas unuaklasa materialo por ŝip-konstruo, pont-farado kaj reltraboj. “Ĉi tiuj grandaj arboj kompreneble havas pli ol cent jarojn?” mi demandis. Mia kamarado kapjesis, kaj montrante du montpintojn, diris: “Sur la montoj Gianfeng kaj Diauluo troviĝas multaj pinarboj, kiuj havas pli ol 500 jarojn, arboj pli-ol-centjaraj povas nur esti la nepoj de tiuj aĝuloj.” Ni ĉiuj eksplodis de rido.

Transveturinte altegan montpinton, inter montoj kaj rivero troviĝis unuetaĝaj kaj pluretaĝaj konstruaĵoj, fabrikoj elvomantaj nigrajn fumkolonojn. Antaŭ ni kuŝas la urbo Tungshi.

Tungshi estas nove prosperanta urbo, la ĉefurbo de la Aŭtonoma Distrikto de Li- kaj Mjaŭ-nacioj en Hajnan-insulo. Antaŭ kvar jaroj, ĉi tie ankoraŭ troviĝis nur sovaĝa herbkovrita montdeklivo kaj niaj gefratoj de Li- kaj Mjaŭ-nacioj vivis ankoraŭ primitivan vivon. Nun ĉi tie jam leviĝis altaj konstruaĵoj, lumas elektraj lampoj, troviĝas ankaŭ komerca kompanio kaj filio de Ŝinhua-librejo. Ĉe ili ankaŭ jam organiziĝis kooperativoj de terkultura produktado. Iu laboranto el la distrikta popola komitato diris al mi ridetante: “Kamarado el Pekino, ĉu vi iam vidis tian miraklon de primitiva komunumo rekte al socialismo?”

Ekveturinte de la urbo Tungshi ni baldaŭ eniris mondon de kokosarboj. Atinginte Jaj-gubernion nia aŭtomobilo turniĝis nordorienten kaj rekuris al la

urbo Hajkoŭ laŭ ŝoseo apudmara. Mara vento blovegadas la kokosarbaron, ke ĝi muĝas kvazaŭ maro furioza. Kiam ni haltis por ripozi ĉe iu urbeto, malgraŭ la laceco mi iris en la kokosarbaron kaj aĉetis kelkajn kokosojn grandajn kiel akvomelono. Ni prenis unu, traboris la ŝelon kaj dolĉa suko elfluis en la buŝon, bongusta kaj soifokvietiga.

Suraŭtiginte ni ĉiuj laŭdis ĉi tian mirindan frukton kun intereso. Tamen, laŭ iu spertulo, kokosarbo ne nur donas al ni fruktojn, sed ĉiu parto de la arbo estas utila. El la karno de la frukto oni povas fari marmeladon kaj kopron, el kiu oni ankoraŭ povas prepari oleon. Kokosoleo estas ne nur manĝaĵo sed ankaŭ kruda materialo por farado de altklasa sapo kaj lubrika oleo. El kokosŝeloj oni povas fari te-tasojn kaj cigarujojn kun delikataj gravuraĵoj, aŭ aktivan karbon por fari kontraŭvenegasajn maskojn; el kokosfibroj, ŝnurojn; el kokosfolioj, matojn; el ĝiaj radikoj, medikamentojn. Kaj kokosa ligno estas bona konstrua materialo.

Mi ne rimarkis ekde kiam la aŭtomobilo jam kuras en kaŭĉukbaro. Oni diris, ke post dek jaroj la kaŭĉukbaroj de Hajnan-insulo jam liveros sufiĉe da kaŭĉuko por plejparte plenumi la bezonon de nia lando.

Ni faris viziton al la kolĥozo Prospero de transmaraj ĉinoj. La kafoberoj sur la kafarboj ruĝas okulfrape. La folioj de rapir-kanabo ŝajnas rapiroj.

Ĝiaj fibroj estas tre fortikaj kaj ŝnuro el ĝi farita dika je pugno povas teni pli ol 17,000 kilogramojn.

Subite nin preterkuris ŝarĝaŭto. Venteto alblovis aroman aeron. En la ŝarĝaŭto estas aroma cinodo, produktaĵo de la kolĥozo, kiu estas nun rikoltanta. Se oni kulturas mil muojn* da aroma cinodo, oni povas interŝanĝi la jaran produkton de oleo el aroma cinodo kontraŭ pli ol 400 traktoroj el eksterlando.

En bone zorgita kulturejo ni vidis ole-palmojn la t.n. "Mondajn Olereĝojn". Unu muo da ole-palmo ĉiujare povas produkti 125-200 kilogramojn da oleo, t.e. kelkoble pli multe ol arakiso.

Post kiam mi revenis al la urbo Hajkoŭ, ĉiuj miaj konatoj opiniis, ke mi revenis tro rapide. Iu sciencisto diris: "Lasu min ekzameni vin. La fluoj de la riveroj de Hajnan-insulo estas grandaj kaj rapidegaj kaj ĉe multaj lokoj oni povas konstrui grandan akvokonservujon kaj hidroelektran stacion. Ĉu vi tion vidis? De Jaj-gubernio nordokcidente ĝis changgan la 300 kilometroj da marborda regiono estas natura saloproduktejo, kiu ĉiujare povus produkti 16,000,000 danojn** da salo, ĉu vi vidis?....."

Liaj demandoj tiel min mirigis, ke nenion mi povis respondi.

*Muo estas ĉina mezurunuo de areo egala al 6.667 aroj.

**Dano estas ĉina mezurunuo egala al 50 kilogramoj.

La Nokto en Pekino

(Daŭrigo de p. 26)

budoj. La akvo en la kuir-poto konstante boladas kaj la klientoj ĉiam povas havigi al si ŝaf-stomakon freŝe kuiritan kun speciala bongusto. Ĉe Ŝisepajloŭ estas unu ŝaf-stomak-budo kiu kutimas vendadi ĝis post noktomezo. La vendistoj de kuirita koko ankaŭ ofte metas siajn korbojn apud la trink-budoj kaj atendas siajn klientojn. Ekde la lasta jaro ankaŭ fritita koko estas havebla kaj tio pliriĉigis la variecon de refreŝigaĵoj. Inter vintro kaj printempo estas vendata ankaŭ dolĉa noktmanĝaĵo, t.e. jŭanŝjao⁵ En la pasinteco la vendistoj de jŭanŝjao venis nokte al la stratoj surŝultre portante sian portilon kun kaldrono kaj kantante kriproponis sian vendadon. Ilia vendado daŭris ĝis ĉirkaŭ tagiĝo, sed nun malofte vidiĝas tiaj strato-vendistoj. Sed estas multaj jŭanŝjao-vendejoj kaj ili ĉesas vendadi nur en profunda nokto.


Tiaj multspecaj noktomanĝaĵoj havas sian longan historion kaj estas bone konataj al la pekinanoj. Ili scias kie ili akiros ion plej bongustan, tial kiam ili reiras hejmen nokte, ili ofte nature venas al tiuj budoj kiujn ili ŝatas, sidiĝas kaj manĝas babilante kun la aliaj. La pekinanoj kutimas diri, "noktmanĝado sur strato estas ankaŭ ripozo." Sendube tiu nokto-manĝo fariĝas unu el la karakterizaĵoj de Pekina nokto.

Mi amas Pekinon. Mi amas la matenon de Pekino, kaj mi amas ankaŭ ĝiajn vesperon kaj nokton.

Trad. I. Ko

1. Geng—En antikva Ĉinio la nokto dividiĝis en 5 geng-oj kaj ĉiu geng-o egalas du horojn.
2. Pruno-flora tamburo, pekina tamburo, bambuklakilo kaj tamburo—specoj de popolkantado akompanata per bambuklakilo kaj tamburo.
3. Huntun—ĉina pasteĉo kun larĝa faruna franĝo kuirita en supo.
4. Bajgan—ĉina alkoholaĵo simila al vodko.
5. Jŭanŝjao—pasteĉo kun eksteraĵo el glu-riza faruno kaj dolĉa internaĵo.

(Ilustrita de Ĝi-ming)



La Nokto en Pekino

EN la urboj de la antikva Ĉinio estis ĝenerale praktikita la "nokta trafik-malpermeso". Tiu regulo estis provizore nuligita por 3-5 tagoj nur okaze de la "Lanterna Festo" kiam diversformaj lanternoj estis elmontrataj. Ankaŭ en Pekino, kiu fariĝis la ĉefurbo de Ĉinio antaŭ pli ol 800 jaroj, regis la sama kutimo. Dum la Ĉing-dinastio (1644-1911), ĉiuvespere post kiam komenca geng1 (je la 7a horo p.t.m.) aŭdiĝis el la sonoril-turo, la homoj "kun ligna klakilo en la mano kaj sonorileto ĉe la talio" aperis en la stratoj, kaj la sinjoroj inspektistoj de la Naŭ-pordega Administrejo ankaŭ paŝis eksteren malantaŭ la kondukantaj "vent-rezistaj" lanternoj por plenumi sian inspektadon, tiam komenciĝis la "nokta trafik-malpermeso". Sur la gravaj stratoj ekster la Fronta Pordego kiel "la Bazaro de Perlo kaj Gemo" kaj "Granda Bariero", kiuj estis financa kaj komerca centroj, la barieroj fermiĝis kaj la gardistoj de la komerca korpuso komencis patroli kaj gardestari. Post la fondiĝo de la Respubliko de Ĉinio la "nokta trafik-malpermeso" ne plu ekzistis sed la inspektistoj daŭrigis sian rutinon ĝis 1924. Oni ĉesigis la fermadon de la barieroj kaj la patrolon sur la supre menciitaj stratoj nur en 1935. Ĉu oni povas diri ke de tiam la "nokta trafik-malpermeso" estis abolita en Pekino? Fakte ne. Dum la periodo de civilaj militoj, provizora "nokta trafik-malpermeso" estis ofte neatendite proklamita. Eĉ kiam "nokta trafik-malpermeso" ne estis proklamita, vi povis aŭdi dum irado en nokto subitan, krudan krion, "Halt! kiu vi estas?" Tiam la urbo-pordegoj estis fermitaj ĝuste je la 7-a vespere. Ili estis fermitaj eĉ pli frue aŭ tute ne malfermitaj kiam estis milito. Unuvorte, en la pasinteco la noktoj en Pekino estis karakterizitaj de soleco kaj malvigleco.

Post la liberigo ŝanĝiĝis Pekino kaj ankaŭ ĝia nokto. La urbo-pordegoj estis forigitaj kaj la urbo-muroj estis breĉigitaj inter la pordegoj por plifaciligi la trafikon inter la urbo kaj la antaŭurboj. Kiam oni iras sur la stratoj dum-nokte, oni ne plu estas pridemandata survoje kaj ne sentas tian solecon kiel antaŭe. La strat-purigistoj diligente plenumas sian taskon dum la milionoj da loĝantoj profunde dormas. Kunlaborante kun ili la ŝoforoj transportas per siaj ŝarĝaŭtoj balaaĵojn ekster la urbon. Ankaŭ en la nokto grandegaj segligno kaj longegaj ŝtal-stangoj por konstruado estas sendataj al diversaj lokoj por eviti trafikan malfacilecon en la tago. Certe en tiaj noktoj la irantoj ne sentas solecon.

Nun la "Granda Bariero" ne plu havas barierojn. Tiu ĉi antikva, vivoplena strato, kiun regadis severa "nokta trafik-malpermeso" por kelkaj jarcentoj, hodiaŭ prenas vere prosperan aspekton. Povas esti ke iu ajn kiu iam venis aŭ ankoraŭ ne venis al Pekino scias, ke ekster la Fronta Pordego troviĝas strato kun tiu nomo. Post kiam la ĉina ĉefurbo translokiĝis al Pekino en 1403 dum la regado de la Imperiestro Junglo de Ming-dinastio (1368-1644), tiu strato estis bone konata pro siaj multnombraj vendejoj. Ĝi fariĝis eĉ pli prospera kiam la Ekstera Urbo konstruiĝis en 1553. Estas maloftaĵo ke strato ne tre larĝa prosperadas dum pli ol 400 jaroj. Pro la granda nombro, longa historio kaj tradicia honesteco de la vendejoj sur tiu strato, ĉiam svarmas granda nombro da vizitantoj. Pro tio estiĝis inter la pekinanoj la populara diro: "Ne kunpuŝiĝu, vi ankoraŭ ne atingis la Grandan Barieron!" En la pasinteco, teatroj sur tiu strato neniam faris noktan prezentadon. Nun, ĉiuvespere prezentiĝas Pekina opero kun sia laŭta muziko en Ĉinglo-teatro starigita tie antaŭ pli ol 100 jaroj. Novaj teatraĵoj estas ludataj en la Frontpordega Teatreto ĉe la okcidenta fino de la strato. Dagŭanloŭ, la plej malnova kinejo en Pekino, estas nun unu el la unuarangaj kaj tie vesperaj prezentadoj ĉiam sekvas unu la alian. Post kiam la teatroj fermiĝas, la rigardantoj kutime iras al familiaraj lokoj por nokto-manĝo. Ili ne timas malfruiĝon, ĉar ili ĉiam trovas tramojn kaj aŭtobusojn por reiri hejmen. Eĉ je duono post la 23a horo oni povas reiri per la lasta veturilo. Antaŭe, sur la Granda Bariero regis ĉiunokte mallumo kaj malvarmo, sed nun ĝi estas tiel hele prilumata ke oni povas facile vidi pinglon teren falintan. Sur la vizaĝoj de la vizitantoj kaj vendejo-klientoj estas videbla la miemo de ĝojo kaj kontento. Sed tiu ĉi ne estas la sola strato kiu montras signojn de viveco dumnokta. Sur aliaj stratoj kiel Ŭangfuĝing, Ŝidan-pajloŭ, Ŝianjukoŭ kaj Lungfuse, lampoj pompe brilas kaj multaj homoj iras tien kaj reen.

En Pekino nun troviĝas pli ol 40 teatroj kaj kinejoj, 2-3 prezentejoj de bardaĵoj kaj amuzaĵoj, 2-3 subĉielaj teatroj kaj ankaŭ pli ol 30 histori-rakontejoj. Krome, en ĉiuj kvartaloj estas laboristaj kluboj kaj aŭditorioj de institucioj kie de tempo al tempo prezentiĝas teatraĵoj kaj filmoj. Mi ne parolos pri la tagoj, kiam la noktoj venas kaj elektraj lampoj ekbrilas, vidu, ĉi tie estas prezentata "Sur Ŝanggan-montaro" tie "Meznokta Kanto". La

neonlampoj ekster la pordoj de kinejoj ruĝigas la vizaĝojn de la homoj, kiuj atendas sian vicon por aĉeti biletojn kaj eniri. Unu rigardantaro eliras, tuj eniras la dua, dume la tria jam atendas sian vicon. La samo ripetiĝas ĝis la fino de la lasta prezentado. Okaze de la lunkalendaro Nov-jaro, parto de la kinejoj donas ekstran noktan prezentadon kiu ĝenerale komenciĝas de 10.40 p.t.m., tiam la rigardantaro hejmen iras pli malfrue. Kiam noktiĝas, aŭskultu kaj vi aŭdos: jen ĉi tie estas ludataj lokaj teatraĵoj, jen prezentiĝas tie prun-flora tamburo² pekina tamburo² humora dialogo, histori-rakontado kaj bambuklakilo kaj tamburo². Krome ni ankaŭ trovas koncertojn kaj akrobat-ludojn. Ĉio ĉi tio faras Pekinon urbo sen nokto. Sur via vojo hejmen meznokte eble viaj oreloj povas kapti frazojn el la rakontata "Historio de la Suj- kaj Tang-dinastioj" aŭ "la Fervoja Gerilo". En la pasinteco ĉiuj teatroj

kaj kinejoj koncentriĝis en komercaj regionoj kaj nur la plejparto de la histori-rakontadoj dise lokiĝis sur diversaj stratetoj. Homoj kiuj loĝis ekster la urbo, ne havis ŝancon viziti ilin. Eĉ tiuj kiuj loĝis ĉe la anguloj kaj randoj de la urbo trovis grandan malfacilon por sin amuzi. Nun la situacio tute ŝanĝiĝis. Ne nur la urbopordegoj estis forigitaj kaj la tempon de cirkulado de la tramoj kaj aŭtobusoj plilongiĝis, sed la registaro ankaŭ starigis multajn teatrojn kaj kinejojn sur la tiel nomitaj humilaj malproksimaj stratoj. Sur la malmulte irataj Orienta Strato de Ĝiaŭdaŭkoŭ kaj Orienta Strato de Ŝianjukoŭ kaj Ĝuang'anmen-strato "malproksima" en la okcidenta parto de la Ekstera Urbo, grandaj novtipaj kinejoj estas malfermitaj. En la suda parto de Tianĉiaŭ-strato, kie antaŭe piedirantoj ne volis trapasi en la nokto, konstruiĝis la granda Tianĉiaŭ-teatro. Ĉi tie ensembloj de internacie konataj dramoj,

operoj, muzikoj kaj dancoj renkontiĝas kun la popolo de la ĉefurbo. En tiu teatro iam prezentiĝis la Sovetia "Cigno-lago" kaj la korea "Biografio de Ĉun Ŝiang". En la pasinta tempo la loĝantoj najbare de la Suntemplo ĉe la sud-orienta angulo de la Ekstera Urbo tre malofte eliris post la fermiĝo de la urbo-pordegoj. Nun tie estas konstruita la granda gimnastikejo, kie ofte okazas tutlandaj aŭ internaciaj gimnastikaj konkursoj. La Sovetia akrobat-grupo faris tie sian prezentadon. Kiam grandaj konkursoj malfermiĝas, la tram-kompanio disponigas aldonajn malfrujajn tramojn al la rigardantaro (la tramvojo tie estis konstruita nur post la konstruo de la gimnastikejo). Por egaligi la densecon de la amuzejoj kaj por la oportuneco de la popolamaso, la plejparto de la distrikta laboristaj kluboj estas starigitaj en tiuj lokoj kie sin trovas malmulte da teatroj. Ekz. la laborista klubo de Sidan-distrikto situas proksime de la okcidenta urbomuro, kaj la laborista klubo de Dungdan-distrikto lokiĝas ne malproksime de la Ĉaŭjang-pordego. Tial, eĉ dum la nokto, en ĉiuj anguloj de la Interna Urbo aŭ Ekstera urbo





1937. 3. 17. J. B. J.


ne mankas irantoj. Ni povas diri ke ĉie brilaj estas la lampoj, ebena la vojo, multaj la irantoj.

La nokto en Pekino ne plu sentigas solecon. Oni povas ne nur rigardi filmojn kaj teatraĵojn kaj aŭskulti kantadojn, sed ankaŭ facile havigi al si nokt-manĝeton. La Pekinaj nokt-manĝoj estas mult-specaj. Krom la malsamaj frandaĵoj de la Ŝanhajaj, Kiangsuaj kaj Kantonaj refreŝigejoj kiuj estis starigitaj post la liberigo, ni trovas multajn aliajn kun speciala Pekina gusto. Tiaj manĝaĵoj estas bongustaj kaj malkaraj. Post filmo-prezentado aŭ post deĵoro aŭ kunveno oni povas bone sin refreŝigi per tiuj manĝaĵoj, pagante nur 20-30 cendojn. La vendistoj de Pekinaj refreŝigaĵoj plejparte starigas siajn budojn surstrate. Nur malmultaj el ili servas al la klientoj en unu aŭ du ĉambroj, kaj tiuokaze oni ankaŭ povas vidi deekstere la brilajn lampojn kaj la leviĝantan varman vaporon. Tiuj vendistoj troviĝas en diversaj lokoj tra la tuta urbo kaj ankaŭ apud la urbo-pordegoj. La noktaj irantoj povas de malproksime vidi aron da lumoj ĉirkaŭataj de multaj klientoj kaj tiu sceno aldonas apartan ĉarmon al la nokto de Pekino. Parto de tiuj vendistoj iras de strato al strato kun siaj ŝultro-portiloj. En la profunda nokto iliaj melodijaj krioj aŭdataj de malproksime estas plenaj de poezio. La matenmanĝeto kaj nokt-menĝeto de Pekino ne similas unu al la alia. Ĝenerale la maten-manĝeto konsistas ĉefe el vegetaĵoj dum la nokt-manĝeto ĉefe el viandaĵoj. Ĉiutage kiam la suno iras suben, la kuiraj fornoj estas ekhejtataj, la vendistoj ekaranĝas siajn budojn. Kiam la fornoj kaj la budoj pretiĝas kaj la strat-lampoj eklumas,

tiam ankaŭ la lampoj super la budoj ekbrilas kaj la negoco komenciĝas. La negoca tempo daŭras tre longe kaj finiĝas plej frue post la 24-a horo, kaj plej malfrue ĝis la 2-a aŭ 3-a horo. Huntun-o3 formas la ĉefan parton de la nokt-manĝaĵoj kun Pekina gusto. En la kaldronoj de la huntun-budoj bolas grasa viandsupo kaj en la vitroŝirmilo estas diversaj spicoj. La vendistoj faras la pasteĉojn tuj antaŭ la kuirado kiu bezonas nur 2-3 minutojn. Kvankam la vendisto devas plenumi ĉian laboron per si mem, li facile plenumas la servadon al 7-8 klientoj kiuj manĝas samtempe. En lia

kaldrono ankaŭ senŝeligitaj ovoj ofte estas kuirataj. Tiuj ovoj kun huntun-suppo estas eksterordinare bongustaj. Por pliprosporigi sian komercon la vendistoj ofte starigas siajn budojn unu apud la alia. Najbare de vendisto de huntun-o kiu estas kun suppo, ofte troviĝas vendisto de bakitaj kukoj. Ĉar oni kutimas manĝi bakitan kukon kun viando, tial proksime de tia vendisto estas vendistoj kiuj vendas fumajitan pork-kapon, spicitan azen-viandon kaj ŝafajon kuiritan kun aŭ sen saŭco. Tiamaniere la vendistoj facile vendas siajn varojn plenumante la bezonon de siaj klientoj kiuj povas fari elekton laŭplaĉe. Sin trovas ankaŭ vendistoj kiuj vendas spicitajn pastbulojn, frititan fabo-kazeon kaj kuiritajn maldikajn intestojn. Krom ordinaraĵoj kukoj, bovlangokukoj, rostil-kukoj kaj krispaj kukoj, haveblaj estas ankaŭ la Pekinaj sako-kukoj (populare nomita viandkukoj). Kiam aŭdiĝas "tin—tin—tin!" la frapado de la patego fare de la vendisto de viand-kukoj, la noktaj hejmen-irantoj estas allogataj eĉ de malproksime al lia budo por manĝi. La Pekinaj vendistoj de nokt-refreŝigaĵoj estas tre pripensemaj; ili scias ke iliaj klientoj estas homoj kiuj laboras tuttage, tial ili pretigas bajgan-on⁴ por ke tiuj klientoj trinku du aŭ tri glasojn por forpeli noktman malvarmon. Lastjare, dum la plej varmega sezono, la huntun-kaj viandkuko-vendistoj kontraŭ la Pekina Teatro provizis siajn klientojn per glaciigita biero. Ĉar oni trinkas, oni bezonas ankaŭ bongustaĵojn por manĝi dum la trinkado. Tiucele oni facile trovas specialan rapidkuiritan ŝaf-stomakon de Pekino inter la diversaj

(Daŭrigo sur p. 23)



LA Tibeta popolo estas unu el la laboremaj kaj heroaj frataj nacioj de nia granda patrio posedantaj longdaŭran kulturen tradicion. Dum la procezo de sia historia disvolviĝo ĝi kreis abundan kaj diverskoloran kulturon kaj arton de sia nacio, kiu nature formas treege eminentan parton de la kultura kaj arta heredaĵo de Ĉinio.

La Tibeta popolo kredas je budaismo. Ekde la sepa jarcento, kiam Sunzankampo unuiginte diversajn tribojn fariĝis reĝo, ĝis hodiaŭ, dum 1,300 jaroj la tiea laboranta popolo kreis milojn da grandaj kaj malgrandaj temploj kaj monaĥejoj sur la Tibet-Sikang-a Altebenejo, pentraĵojn sur muroj kaj ŝtofo per mineralaj farboj, skulptaĵojn el ŝtono, ligno, argilo, bronzo, arĝento aŭ oro, diversspecajn metiartaĵojn kaj multajn aliajn artaĵojn kiel gravuraĵojn delikatajn kaj fortopenajn kaj lakonece gravuritajn.

La urbo Lhasa estas la centro de budaismo en Tibeto. Krome ĝi ankaŭ estas la ĉefurbo de politiko, ekonomio kaj kulturo de la tibetanoj. Tio, kio ĉefe reprezentas la budaisman kulturon kaj la intiman rilaton inter la Han-a kaj Tibeta nacioj, estas la Culakang-templo, kiu estas konstruita, laŭ tradicio, en la dek-kvina jaro de Ĝenguan de la Tang-dinastio, dum la periodo de post 641 p.K. kiam Princino Ŭenĉeng de la ĉina imperiestro edziniĝis al la Tibeta reĝo Sunzankampo, ĝis 650 p.K.. Kontraŭ la pordego de la templo estas la "princina saliko", kiun plantis la princino propramane. Antaŭ la saliko troviĝas la monumento de "Alianco inter Onklo kaj Nevo", kiun starigis en 762 la Tibeta reĝo Ĉisungtjuceng, filo de Princino Ĝinĉeng, kaj la tiama imperiestro De-zung de la Tang-dinastio. La strukturo de la templo estas sube granda kaj supre malgranda. La eksteraj kaj internaj ĉefmuroj estas konstruitaj el granito. La kadroj de la pordoj kaj fenestroj estas ankaŭ kon-

formaj al la tuta strukturo, t.e. sube grandaj kaj supre malgrandaj. De la dua etaĝo ĝis la kvara etaĝo la templo havas terasojn, sur kiuj konstruiĝis palacaj konstruaĵoj de lignaj skeletoj. La tegoloj kaj la ĉirkaŭaj reliefaj kaj rond-reliefaj ornamaĵoj de la palacoj estas el orumita bronzo. Tia estas la arĥitektura formo ankaŭ de ĉiuj aliaj temploj kaj monaĥejoj. Ekzemple, la suba parto de Cipoĉang-palaco estas kasteltipa, altas je ses ĝis dek kvin etaĝoj, kaj sur ĝiaj terasoj konstruiĝis ses aŭ sep palacoj de ligna strukturo, en kiuj sin trovas centoj da sutro-salonoj kaj pentraĵo-koridoroj. Tio estas la plej grandaj karakterizaĵoj de la arĥitektura stilo de Tibetaj konstruaĵoj. Kaj la strukturo de la Gaden-templo, Serra-templo, Ĉepung-templo kaj Ĉaŝilhunpo-templo estas same tia.

En la unua etaĝo de la Culakang-templo, ĉe la antikva pordo kaj la fasado kaj la flankaj muroj de la ĉefa halo, staras ĉirkaŭ dudek lignaj kolonegoj kun kapitulo, sur kiuj estas reliefoj de figuroj de nudaj aŭ vestitaj homoj, cignoj, bovoj ŝafoj, kaj aliaj bestoj. La artverkoj estas eminentaj kaj multnombraj. Ili estas tiel ĉizitaj, ke ne nur la figuroj estas vivecaj kaj similas al realaĵoj, sed la ĉizmanieroj estas tre rafinitaj kaj veteranaj. El tio oni povas facile rimarki ilian altan artnivelon kaj vicigi ilin inter la unuarangajn antikvajn verkojn. La koridoroj ĉirkaŭaj havas du murojn, la internan kaj la eksteran, kiuj ambaŭ havas grandajn freskojn, kiuj priskribas la vivojn de Ŝakamunio¹, Cunkapa k.a. aŭ prezentas la portretojn de reĝoj kaj grandaj bonzoj diversepokaj. Interalie sin trovas ses aŭ sep sufiĉe grandaj verkoj, kiuj estas tre similaj al la Han-aj pentraĵoj en la Tang-dinastio en la pentrostilo de simplaj linioj kaj sennuanca kolorigado. Sed pro la longdaŭra fulgigado per incens- kaj ole-fumoj, ili fariĝis brile nigraj. Krom tio, la diversgeneraciaj pentristoj ankaŭ plurfoje repentris ilin laŭ ordono,

sekve la originalaj formoj jam de longe ne ekzistas plu. Tamen kelk-loke ankoraŭ vidiĝas iom da iliaj postsignoj. Ekzemple, en parto de la freskoj sub la temo "la Gepatroj de la Budao de Sangĝjetunki" estas ankoraŭ rimarkebla la influo de la Tang-dinastia pentrarto en strekado kaj kolorigado. Pli supre de la dua etaĝo en la templo estas ses palac-formaj konstruaĵoj, eksterordinare grandiozaj kaj pompaj. El ĉiuj artverkoj de reliefoj, rondreliefoj, kaj pentraj-ruloj el diversaj materialoj oni povas rimarki la postsignon de kulturaj interfluo inter la Han-a kaj Tibeta nacioj.

Dum la jaroj 960-1279 p.K., pro la malpaciĝo inter religiaj sektoj, la socio displitiĝis, kaj kaŭze de la sekvanta detruigo de produktopovo kaj la limigo de ekonomiaj kaj materiaj kondiĉoj, la disvolviĝo de tiama arto estis ĝenerale ne sufiĉe vigla. Tamen laŭ parto de la figuraj pentraĵoj en la Ĉikung-templo, la ĝis hodiaŭ postrestanta heredaĵo, parta disvolviĝo estas ankoraŭ videbla. La komponado, kolorigado kaj strekado estas ĉie intense influitaj de la Han-a pentrarto. Tibetaj pentristoj diris: "Tiaj estas Han-tipaj pentraĵoj." Sed efektive ili estas riĉaj je naciaj karakterizaĵoj kun tendenco de la Han-a pentrarto en stilo.

La figuramento de la skulptaĵoj de la "dek-ses sanktuloj" en la Belkorĉjuden-templo en Ĝjelci, faritaj dum la epoko de la Juan-dinastio (1277-1367 p.K.) estas realisma kaj ilia ĉizmaniero estas simila al tiu de parto de la skulptaĵoj de la Tang- kaj Sung-dinastioj.

Skulptita Kolono



Dum la jaroj 1363-1643, pro la senĉesa interbatalado inter diversaj triboj por kapti politikan potencon ĉe la fino de la Juan-dinastio kaj la komenco de la Ming-dinastio, multaj temploj kaj monaĥejoj estis ruinitaj. Sed post kiam Cunkapa, la fondinto de la Flava Lamaismo, eniris Tibeton en la unuaj jaroj de Ming-dinastio, li komencis unuigi la politikan kaj religian potencojn kaj ĉiuflanke efektivigis multe da plibonigoj. Krom la tri famaj grandaj temploj li ankaŭ starigis aliajn grandajn templojn kiel la Ĉaŝilhunpo-templon. La arkitektura kreo jam disvolviĝis ĝis tre alta stadio. Sekvante la konstruadon kaj pligrandigadon de temploj kaj monaĥejoj,

ĉiuj budaismaj artoj de pentrado, skulptado kaj metiartoj ankaŭ vaste disvolviĝis. Tio estis unu el la brilaj paĝoj en la historio de Tibeta arto.

Dum la epoko de la Ĉing-dinastio (1644-1911 p.K.), Imperiestro Ŝunĉe sendis mongolan princon Kŭoŝitenzenĉjuĝjel al Tibeto por subteni la Kvinan Dalaj-lamaon teni sian politikan potencon. Kiam Tibeto estis sub la regado de la Flava Lamaismo kaj stariĝis vere koncentrigita registaro, en kiu religio kaj politiko estis en unu potenco, produktopovo ricevis pluan reviviĝon kaj disvolviĝon. Pligrandiĝis la tri grandaj temploj kaj rekonstruiĝis la Cipoĉang-palaco, kies konstruado kaj interna ornamado komenciĝis en la jaro 1645 kaj kiu finkonstruiĝis post pli ol 50 jaroj. La Kvinna Dalaj-lamao skribis en sia biografio: "Nur en la jaro 1648 komenciĝis la pentrado de la freskoj en la Cipoĉang-palaco. Sesdek ses pentristoj koncentriĝis kaj finis la laboron post dekkelkaj jaroj."



Sunzankampo

(Rondreliefjo)

Inter la centoj da verkoj faritaj de du eminentaj pentristoj en la jaroj 1649 kaj 1668 respektive, "Kŭoŝitenzenĉjuĝjel kaj Desisangĝjeĝjaco" kaj la "Pilgrimo al la Kvinna Dalaj-lamao" estas la plej bonaj. La enhavoj de aliaj pentraĵoj estas bazataj ĉefe sur la legendoj kaj rakontoj el la sutro. Ĉiuj verkoj estas pentritaj per la malsupren-rigardanta metodo kaj ilia kolorigado kaj strekado multe inklinas al la stilo de la Han-a pentrarto. Galun Dokar Puncorjebĝje de la Loka Registaro de Tibeto diris: "En la pasinteco la Tibetaj artistoj plejparte

prenis artverkojn de la Han-a nacio kiel sian modelon kaj adoptinte la esencon, produktis siajn artaĵojn per necesa prilaborado." Tendenco al realismo kun ĉeftemo tre klara kaj difinita estas altvalora karakterizaĵo de la Tibetaj artverkoj de ĉiuj generacioj precipe de la Ming- kaj Ĉing-dinastioj. Tiuj pentristoj decidis la komponadon laŭ la ĉefa temo, kaj la grandecon, helecon, proksimecon de la personoj kaj de la fono laŭ bezono. En komponado atentis pri spaco, ekvilibro kaj koncentriĝo, sed ne ĉio en simetrio. Ekzemple, en la pentraj-ruloj de budaoj kaj reĝoj en la Ĉikung-templo la artistoj profunde enpenetris kaj plene esprimis la "majestan kaj trankvilan" penson kaj senton de la budaoj, atingante maturecon kaj sukceson en tekniko, ke la pentraĵo estas tiel alloga impresiva. Aliaj ekzemploj, kiel la pentraĵo de la "Han-a Reĝo en la Biografio de Gunĉoĵenra" multe influitaj de la Han-a pentrarto, la pentraĵoj de la "Oferado", la "Dancistinoj" kaj la "Dek-ses Ĉielaj Muzikistinoj" en la Ŝarlho-templo multe influitaj de la hinda kaj Nepala, ĉiuj havas tendencon al realismo. Interalie la karaktero de la dancistinoj kaj la apudaj muzikistoj en la pentraĵo "Dancistinoj" estas tiel vivece prezentitaj, ke la rigardantoj ne nur vidas la facilmovan, gracian dancmanieron, sed ankaŭ ŝajnas aŭdi la kortuŝan muziksonon. Ĝi estas ja malofta majstraĵo. En la komponado kaj figuramento de la tradiciaj pentraĵoj de Tibeta popolo sin trovas alia karakterizaĵo: en ĉiu ajn pentraĵo de persono aŭ rakonto, la ĉefa(j) persono(j) estas aranĝita(j) en la mezo, okupanta(j) la plej grandan spacon de la pentraĵo, dum la aliaj estas simetrie aranĝitaj supre kaj malsupre, dekstre kaj maldekstre, kaj akompanantajn personojn, animalojn kaj la fonon pentris la pentristo pli malgrandaj, por reliefi la imponajn kaj netuŝeble sanktajn figurojn de la ĉefaj personoj, la bodisatvoj. Oni uzis la linian perspektivon. La malsuprenrigarda perspektivo estis aplikata por la figuramento. Ambaŭ realismo kaj idealismo estis aplikataj samtempe. Precipe en la kolorigado ili multe pentris per unuopaj koloroj, intermetitaj koloroj, ruĝo, verdo aŭ orkoloro, libere kunagorditaj, lerte kaj aplombe aplikataj, akirante unuecon kaj harmonion el malakordo kaj elmontrante klarecon, brilecon kaj elegantan belecon. Tia kolortono bone harmonias kun la propraj karakterizaĵoj de braveco, necedemo, entuziasmo, vigeleco, grandanimeco kaj saĝeco de la Tibeta popolo. Tio estas alia speciala aspekto de la Tibeta arto.

Sur ambaŭ flankoj de la pordego de la ĉefa halo en la Culakang-templo estas du freskoj pri Ŝakamunio, kaj sur la muroj de la koridoroj, tiuj de Ĉisungtjuceng k.a. En la komponado de ĉiu fresko la portreto de la budao estas ĉiam lokita en la mezo kaj en la supra, malsupra, dekstra kaj maldekstra partoj estas oferantoj de religiuloj kaj korteganinoj, viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj.



Princino Ŭenceng (Rondreliefo)

Ili estas pentritaj antaŭaj aŭ malantaŭaj, grandaj aŭ malgrandaj, laŭ la ordo de siaj rangoj. La fono konsistas el ornamecaj desegnaĵoj. La artistoj bildigis tiajn ĉefajn personojn, kiaj Ŝakamunio aŭ Ĉisungtjuceng, laŭ la principo de religia pentrarto. Ekzemple, la mienoj de budaoj, reĝoj kaj bodisatvoj devas esti majestaj kaj trankvilaj, iliaj staturoj pli grandaj, iliaj vizaĝoj kvadrataj kun konturstrekoj maldikaj, akraj kaj fortoplenaj, ke la fizionomio fariĝas alte respektinda. Rilate al la servantaj korteganinoj, atento estas metita ankaŭ sur la beleco de ekvilibro kaj ĉarmo, facilmovo, gracieco kaj virteco de pozo. Iliaj haroj estas en formo de bluaj litorinaro kaj la harornamaĵoj laŭ iliaj rangoj, kio donas efikon de gracio kaj eleganteco. En sia figuramento kaj kolorigado la pentristoj sendube elspezis grandan energion. Kvankam ili uzis la metodon de linia perspektivo anstataŭ tiu de aera perspektivo per forta kontrasto de nuancado de lumo kaj mallumo, ili jam povis plene esprimi la diversajn karakterojn de la budaoj, reĝoj kaj virinoj, kaj la molecon kaj kolorecon de diversspecaj haŭtoj. Per simplaj linioj, ili konturis figurojn de personoj ok-naŭ futojn altajn sen abrupta rompo de ilia fono kaj la penikmovo estis fluaj kaj ĝisfinaj kiel fluanta akvo kaj rapidmova vento montrante ne nur fortecon kaj firmecon, sed ankaŭ unuecon kaj akordon.



Unu el la Dek
Ses Sanktuloj

En Deĉingpoĉang, la vilapalaco de Panĉen Ngoertehni en Ŝjegaz, sin trovas kvar futojn alta kaj dek futojn larĝa fresko, kies ĉeftemo estas Paba Ĉjueĝiel Sur Sia Vojo al Mongolio por Viziti la Kortegon de Kublajhano, la Fondinto de la Juandinastio, por Ricevi Aŭdiencon". En la pentraĵo Paba Ĉjueĝiel sidas en reĝa palankeno kun granda nombro da akompanantaj oficistoj kaj soldatoj antaŭ kaj malantaŭ si kaj sia

majesta, dignoplena kavalerio, bonvenigata de altrangaj oficistoj senditaj de la Juan-a kortego kun hataoj² tenataj en la manoj. La kostumoj kaj instrumentoj, la kutimoj kaj moroj, kaj la pensoj, sentoj kaj karaktero de ĉiuj personoj estas bildigitaj tute laŭ iliaj respektivaj rangoj kaj pozicioj. Kun paŝtista regiono kiel la fono, kie vidiĝas montoj, riveroj, arboj kaj aroj da bovoj, ŝafoj kaj kameloj, ĉio estas reala kopio de la stepa pejzaĝo. El tia temo kaj tia detala prezentado de la enhavo oni povas facile vidi, kian profundan komprenon de la vivo posedis la aŭtoro kaj kompare kun aliaj tradiciaj pentraĵoj, kian grandan diferencan en la esprimmetodo havas la verko. La aŭtoro prenis tiun epizodon de la historio por speguli ĉiufanke la realajn trajtojn de ĉiuj lia-tempaj socitavoloj de la regantoj ĝis la tiel nomataj plebanoj. Oni ankaŭ povas vidi el la strukturo de la supre menciita fresko, kiel la pentristo pere de realisma metodo sin teze esprimis diversspecajn figurojn kaj plurajn intrigojn sur unu pentraĵo. Li utiligis ardajn sed simplajn tonojn de koloroj kaj estis tre sperta en strekado kaj kunaranĝo de koloroj. Koncerne la kreadon de la figuroj kaj la konsistigon de la sceno, li jam sin liberigis el la kadro de simpla simetrio kaj atingis iom post iom kompleksan sed bonordan komponadon kun ekvilibro inter spaco kaj la efektiva pentro mem. Vidante tiun ĉi freskon, ni tuj sentas ĝin plena je vivo kaj melodio, inspira per viveca sento kaj alloga per intima sinteno. El ĝi ni ankaŭ povas rimarki la vivecon de imag-povo kaj novan stilon de kreado de la pentristo.

Pri la skulptarto de Tibeto ni devas unue menciiti la koncizajn kaj vivecajn lignajn reliefojn en la Culakang-templo. Aliaj elstaraj verkoj estas la statuo de la sagaca kaj virta Princino Ŭen-ĉeng en la Cipoĉang-palaco kaj la brava kaj necedema Budao el Lotusfloro kaj la Budao de Senfina Longviveco en la Ŝarra-templo, ĉiuj argilaj plastikaj rondreliefaj en la Tang-dinastio. La Budao Majtreja³ en la Belkorĉjuden-pagodo en Ĝjelci, la mildaj, ridetantaj "Dek Ses Sanktuloj" kaj la aliaj profunde

enpensigantaj "Dek Ses Sanktuloj" en la Belkor-templo en la sama urbo estas ĉiuj tipaj skulptaĵoj en la Ming-dinastio.


Kvankam la temploj estas de diversaj epokoj kaj la artistoj estis malsamaj, tamen ilia tendenco estas same realisma. Tiuj plastikaj diferencas de la ĝeneralaj plastikaj en esprimmaniero. Rompinte la ordinaran banalan stilon de sanktaj figuroj kaj sin liberiginte de limigoj en la modlado de sanktaj figuroj laŭ fiksitaj normoj, ili per religiaj temoj vidigas la karakterizaĵojn de homa naturo kaj homa vivo kaj reflektas la ideojn kaj sentojn en la ekzistanta vivo. La diversaj sentimentoj de budaoj, lamaoj kaj arahatoj: amo kaj malamo, ĝojo kaj malĝojo, raveco kaj necedemo, optimismo kaj aplombeco, unuvorte, ĉia mensa stato de diversaj karakteroj estas plene bildigata. Tio montras, ke la diversepokaj artistoj detale kaj profunde observadis la vivon kaj nur sekve de tio li povis atingi tiajn efikojn. Heredinte eminentan tradicion de skulptarto, tiuj sennomaj skulptistoj kreis novan stilon de Tibeta arto. Malgraŭ malsimileco en arta stilo tiuj verkoj similas unu al la alia en simpleco, viveco kaj variemo.

La budaisma arto de la Tibeta popolo ne kontraŭas al ekstera influo, kaj ĝi ĉiam sukcese adoptas la eminentaĵojn de aliaj, tamen altenas al sia propra artstilo.

Elĉinigi Pandiŝo

1. La fondinto de budaismo.
2. Peco de silkaĵo kelk-futojn longa uzata de tibetanoj kiel saluta donacaĵo.
3. Ridanta budao kun granda abdomeno.

Fera bildo
sur la
Jangze-rivera
pontego



Esperanto en Ĉinio



POST la 41a Esperanto-kongreso en Kopenhagen, kiun partoprenis niaj delegitoj, sinsekve aperis artikoloj favoraj al Esperanto en la ĉefaj gazetoj Ĵenmin Ĵebao (Papola Ĵurnalo), Ŝeĝie Ĝeŝe (Monda Kulturo) k.a. Multaj legantoj interesiĝis pri Esperanto kaj deziras ĝin lerni. Ili superŝutis per leteroj la redakciojn de tiuj gazetoj kaj la "Ĉina Esperanto-Ligo"-n, petante informon pri lernolibroj.

DANK' al klopodo de niaj kamaradoj, kaj kunlaboro de diversaj organizoj Esperantaj kursoj fondiĝis por gejunuloj, instruistoj, oficistoj kaj laboristoj en Ŝanhajo, Pekino, Ĉungking, Sian k.a. urboj. En Pekina Popola Universitato Esperanto estas enkondukita eĉ kiel nedeviga lernoprogramero. La du unuaj kursoj en tiu universitato daŭros unu jaron. Krome Esperantaj grupoj jam fondiĝis en Pekina Universitato, Nankina Universitato, Seĉuan-a Universitato, Nankaj Universitato (en Tianzin) kaj la Instituto de Fremdaj Lingvoj en Dajren.

EN Pekino fondiĝis Pekina Esperanto-Klubo. Ĝiaj membroj regule kunsidas en ĉiu dua dimanĉo. La ordinara programo de la kunsidoj konsistas el Esperanta paroladeto, gramatika studo, laŭtleĝo, kantado k.t.p. Ĉiufoje ĉeestas ĉ. 50 personoj de

diversaj okupoj. Esperantaj grupoj, rondetoj fondiĝis ankaŭ en aliaj 19 urboj. Unu grupeto de gimnaziaj instruistoj en Pengpu, Anhuej-provinco, havis en la komenco nur 3 membrojn, nun jam 14, kiuj studas Esperanton kun granda entuziasmo.

POR plenumi la bezonon de nova lernolibro por memlernantaj komencantoj. "Elementa Kurso de Esperanto" estas kompilata de k-do Venlo Fon. 14 lecionoj jam pretiĝis kaj multobligite sendiĝis al la bezonantoj. Malnovaj libroj kiel "Ses Paroladoj pri Esperanto" "Unua Paŝo en Esperanto" k.a. forvendiĝas sufiĉe rapide, kaj kelkaj el ili tute elĉerpigis. Pli ol 1.500 personoj ricevis la 20-paĝan Bultenon de Ĉina Esperanto-Ligo.

Kunveno de Festo kaj Amikeco

La 20an de okt., en Pekino okazis esperantista kunveno por antaŭe celebri la 40an datrevenon de la Oktobra Revolucio kaj adiaŭi Sovetian esperantiston, K-do D. L. Armand, specialisto pri akvokonservado.

La kunvenon partoprenis 56 personoj, kiujn regis la festa atmosfero kaj multaj vigliĝis en interparolado antaŭ kaj post la solena celebrado.

Oni aŭskultis Esperantajn paroladojn de K-do Armand kaj de K-doĵ Hujucz kaj Chang Chi-cheng, la prezidanto kaj la sekretario de ĈEL.

K-do Armand emfazis interalie la bezonon de Esperanto per sia propra sperto, dirante ke li devis paroli en la angla lingvo kun ĉinaj scienculoj, ĉar li ne povoscias la ĉinan lingvon kaj ili ne la rusan.

K-do Chang Chi-cheng salutis la grandan tagon kaj dankis la Sovetiajn esperantistojn kiuj multe helpis al nia Esperanta laboro antaŭ la liberigo en interŝanĝo de Esperantaj materialoj. Li esprimis la esperon, ke Sovetiaĵs-anoj denove nin helpos en niaj Esp-laboroj por paco kaj amikeco.

La kunvenintaro ankaŭ gratulis la Sovetian popolon per telegramo kaj fotoj estis faritaj memore al la kunveno.

MULTKOLORAN ESP-KALENDARON

de la jaro 1958 (formato: 27
× 38 cm.) ni donacos al ĉiu
jarabonanto de El Popola
Ĉinio.





Kompilita kaj eldonita de Serbia Esperanto Ligo, en diversaj serioj. Inter ili troviĝas originalaj verkoj tradukitaj verkoj el la serba literaturo, inkluzive prozon, poezion, dramon, popolan literaturon kaj verkojn pri historio, arto kaj aliaj. Ĉiu peco estas en maldika broŝureto.

Per tiu ĉi biblioteko Serbia Esperanto Ligo volas konigi al la esperantistaro de la mondo elektitajn verkojn el la serba literaturo kaj disvastigi Esperantomovadon. Ĝis nun ni ricevis entute el ĝi ses broŝurojn, nome:

- 1) **Provinca Gastejo** (rakonto)
- 2) **Du Noveloj** (Ĉe la Malnova Fajrejo, Silvia)
- 3) **Analfabeto kaj Butono** (du unuaktaj komedioj)
- 4) **Suspektinda Persono** (duakta komedio)
- 5) **Rakontoj el la Naciliberiga Batalo de Jugoslavaj Popoloj**
- 6) **Sonetkrono por la Esperantistaro** (poezio)

Traleĝinte tiujn ĉi broŝurojn mi devas diri, ke Serbia Esperanto Ligo sufiĉe bone efektivigis sian volon. Krom la poemo, pri kiu mi ne kapablas ion diri pro mia senscio tiurilate, ĉiuj verkoj estas interesaj, kaj precipe taŭgas al komencantoj kiel bonaj legaĵoj.

Speciale min interesas la tri komedioj de Branislav Nuiŝiŝ. La verkinto verŝajne tre lertas elekti temon el bagatelaĵoj kaj fosas en ĝi primokindajn havantan ĝeneralan signifon. En la du komedioj "**Suspektinda Persono**" kaj "**Analfabeto**", li priskribis reliefe la avidecon al rango kaj mono, la arogantecon al subuloj kaj la popolo kaj la sencion de la regantaro kaj oni povas elflari la putrecon de la reĝimo feŭdisma. "**Butono**" tuŝis preskaŭ la saman temon, sed en pli mallarĝa sfero. La dramoj ne nur donas al la legantoj plenkoran ridon sed ankaŭ plene malkaŝas la abomenecon de la malpuraj animoj, kaj nekuraceblan velkadon de la putriĝanta reĝimo. La traduko estas flua, facila kaj facile komprenebla eĉ por komencantoj.

"**Rakontoj el la Naciliberiga Batalo de Jugoslavaj Popoloj**" prezentas al la legantoj multajn tre mallongajn rakontojn dum la naciliberiga batalo de Jugoslavio. Ili rememorigas al mi la malfacilajn tagojn dum la invado de japanaj imperialistoj kaj la subpremado de la Kiangkajŝek-reĝimo. Mi komprenas el ili la suferojn, persistecon kaj ĝojon pro venko de la jugoslavaj popoloj. Kaj ili elvokas kunsenton kaj amikecon de la legantoj al jugoslavaj popoloj.

Lingve, ŝajne la tradukinto tro ŝatas uzi neologismojn eĉ ne tre necesajn. Kvankam kelkaj el ili jam troviĝas en la suplemento de la 4-a eldono de P. V., sed ili ne estas kutimaj. Estus bone, ke oni ilin konservu por poezio kaj ne libere enkonduku en prozan verkon. Tiujn netroveblajn en la nomita vortaro oni des pli devas uzi kun granda gardemo, kaj kun necesa klarigo. Kelkaj esprimoj ekz. "*ĉirkaŭ unu mitralo*" por esprimi distancon, "*de ĉiam*" kaj "*kompletaj monatoj*" estas nekorektaj aŭ almenaŭ nekonsilindaj. Ankaŭ ortografion la tradukinto ne zorge kontrolis, ekz. *taburedeto* (p. 16). Ŝajne por komencantoj oni devas bone zorgi

pri tio por ke la lingvo ne fariĝu malfacila kaj konfuza.

La originalaj verkoj "**Du Noveloj**" donas al mi specialan impreson. Kiel kutime, legado de originalaj Esperantaj verkoj estas granda ĝuo, legantoj povas rekte kompreni la animon de la verkinto kaj ne necesas multa cerbumado kiel en la tradukaĵoj. Tion saman mi trovis ankaŭ dum legado de la "**Du Noveloj**", "**Ĉe la Malnova Fajrejo**" kaj "**Silvia**." Laŭ mi ili vere ne estas noveloj, sed bela prozo iom poezia. En ili oni ne renkontis ion spiritstreĉan kaj kompleksan historieton, sed ili altiras la animon de legantoj. Ili revokas belan estintecon, kiujn ĉiuj travivis dum junaĝo. Evidente la verkinto estas sperta verkisto, kvankam tio estas nur liaj unuaj verkoj en Esperanto. Mi bedaŭras nur tion, ke el ili elfluas iom da melankolio, kaj post la legado oni ofte sentas sin iom peza en koro.

Rilate la lingvon ni povas diri, ke ĝi estas flua, simpla kaj bela. Tamen troviĝas en ĝi kelkaj vortoj diskutindaj. Ekz. anstataŭ "senkulpigi" li uzas "pardoni", anstataŭ "mi puŝis lin je la dorso" li skribis "mi puŝis lin en la dorson".

Honfan

KURANTAJ AFEROJ

Kadroj kaj Verkistoj en la Popolamasojn

Sekve de la ekonomia socialisma revolucio en Ĉinio, nun disvolviĝas socialisma revolucio ideologia. Por pliintimiĝi kun la popolamasoj kaj pli bone servi al socialismo, miloj da kadroj iris en la popolamasojn. Inter ili troviĝas ankaŭ k-do Chang Chi-cheng, la sekretario de nia ligo. Ankaŭ ĉirkaŭ 50 Pekinaj verkistoj iris aŭ iros vivadi kaj laboradi kun la popolamasoj por krei verkojn kiuj bone respegulos la vivon de la popolo. Inter ili troviĝas la plej eminentaj verkistoj kiel Ĝaŭ Ŝu-li, Ĝoŭ Li-po, Liu Baj-ju, Tjan Ĝjan, Ĝang Tjan-ji, Jang Ŝuo k.a.

"Feliĉaj Steloj" Aplauditaj en Ĉinio

La du Sovetiaj artefaritaj satelitoj multfoje trakuris la ĉielon super Pekino kaj aliaj lokoj en Ĉinio kaj alportis grandan ĝojon al ni ĉiuj. Multaj bone aŭdis iliajn signalojn per radiaparatoj kaj kelkaj eĉ ilin vidis propraokule. Oni salutas ilin per la nomo "Feliĉaj Steloj".



Bodisatvo Mamjusri (kupra rondreliefo en Serra-templo, Ming-dinastio, 1368-1661 p.K.)



Hejmo de Paŝistoj
(pentraĵo, Ĉing-dinastio,
1644-1911 p.K.)

La Nirvano de Sakamunio
(fresko en Belkor-templo, 15a jarcento)



Gjese Sjunnuĝung
(pentrajrulo, 12a jarcento)





UNIVERSITÄT
KUL
BIBLIOTHEK